


trimestriel  
3ème trimestre  
2013

# LA INFORMILO

N° 163  
30 septembre  
2013



l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières



espéranto  
France-Est



esperanto  
la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

## ESPERANTO France-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

### ESPERANTO

regroupant

les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR - 54000 NANCY


### ABONNEMENT / ABONO

annuel / jara

15 €

eksterlando

18 €



## Reykjavik 2013

1034

congressistes

35 pays

1 langue !



## Universala Kongreso de Esperanto - 20/27 juillet 2013


C'est le magnifique *Palais de la musique et des congrès "Harpa"* qui a servi de cadre aux multiples activités de ce 98ème rassemblement international annuel de l'*Universala Esperanto Asocio* (UEA). La capitale de l'Islande avait déjà accueilli les participants du 62ème congrès en 1977.

Le Président de la République, M. Olafur Ragnar Grimsson, avait tenu à saluer ses invités pour cet évènement exceptionnel...

*"Dès son avènement, l'idéal d'une communauté humaine où création et expression seraient indépendantes de toute ethnie ou de toute nationalité a accompagné l'Espéranto, et permis au mouvement de se muer en union pour la paix et pour l'humanité.*

*Tout au long du siècle nouveau, la technologie a conféré au monde de multiples dimensions, mettant en contact entre autre les hommes de toutes les parties de la planète, faisant fi des frontières, favorisant les changements et les efforts pour assurer la progression de l'Espéranto. Une période nouvelle commence, avec des chances de succès plus variés qu'ils ne le furent jusqu'ici.*

*Le Congrès Universel d'Espéranto, qui tient ses assises aujourd'hui à "Harpa", est l'occasion idéale pour prêter attention à l'avenir, alors que nous louons avec respect le travail déjà effectué pour la promotion de l'Espéranto. Je vous souhaite la bienvenue à ce Congrès et souhaite au mouvement plein succès dans le futur".*

<b>Espéranto France-Est</b>		<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction: Redaktoro:</b>	<b>PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC</b>	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelincolnot@orange.fr
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	fredporretti@gmail.com
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06 34 33 68 93	mirantur2@yahoo.fr
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr

<b>Abono al La Informilo →</b>	Francio: 15 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>	← <b>Paiement par chèque au nom de</b>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>	← <b>Paiement par virement au compte</b>
Bank- aŭ poŝ-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1 Reĵkjavik 2013 2 Ours 3 Angulo de la Prezidanto 4 Révolution UK 5 Nova teamo 6 " 7 Antaŭkongreso UK 8 " 9 " 10 " 11 Kongreso UK 12 " 13 BERN 1913 14 Albanie 15 " 16 "	17 " 18 Herzberg ILEI 19 " 20 Stage 2014 21 Décès A. Jacquard 22 Mariage Bruno 23 Strasb. / Grésillon 24 Kalejdoskopo 25 DVD-film SAT 26 Rubrique interl. 27 Libroservo 28 " 29 Abonoj 2014 30 Anekdotoj 31 Distra angulo 32 Fototeko	<b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b> <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b> bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle <b>Esperanto France-Est</b> MJC PhiJippe Desforges – 27 rue de la République <b>54000 NANCY</b> Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b> Rédacteur : <b>PoI DENIS</b> Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b> Imprimé par l'imprimerie de l'encre <b>55000 Hargeville-sur-Chée</b>
---	--	--



Estimataj samideanoj,



Meze de junio mi kun plezuro ĉeestis en Gérardmer la prelegon de nia ĉeĥa samideano Peter CHRDLE, kiu turneis tra Eŭropo. Li ĉi-okaze alportis al nia senlaca aktivulino, Ginette MARTIN, la stokon de la franclingva eldono de la romano *Flugi kun kakatuoj* de la aŭstraliano Trevor STEELE. Ties tradukon prizorgis Ginette MARTIN, helpe de efikega skipo da tradukistoj.

**Admirinda laboro inda por bela donaco al viaj geamikoj neesperantistaj !**

Ĉi-okaze mi akiris ankaŭ aliajn librojn de la eldonejo *Kava-Pech*. En poemaro de la ĉeĥa poetino *Eli Urbanová* mi malkovris la suban poemon laŭdantan nian lingvon ! Mi opinias, ke ŝia mesaĝo perpoema pli efikas ol kuraĝigoj de regiona prezidanto ! Legu kaj ĝuu !

Edmond LUDWIG

## *Mi aŭdis esperantajn kantojn ...*

*Ho, melodio dolĉdolora !  
Ho, verso, verso vi sonora !  
Unika tuto de du ĉarmoj  
Ree inspiris min ĝis larmoj.*

*Se aŭdas mi la vortojn flui :  
Flavaj grenkampoj ritme ondas.  
Se aŭdas mi la arpeĝojn brui :  
Verdblua maro forte tondras.*

*Ja kia forto ! Kia vivo !  
Kaj iu diras : Lingvo arta.  
Verko kreita por arkivo.  
Ne estas vero. Eĉ ne parto.*

*Ho, melodio dolĉdolora !  
Ho, verso, verso vi sonora !  
Min ne kalkulu en dubantojn.  
Mi aŭdis Esperantajn kantojn.*

*Pour vous initier à la seule  
vraie langue internationale...*

*Pour vous perfectionner  
ou éprouver le plaisir rare de converser  
en espéranto !...*

*Pour profiter  
de nos stages, de nos rencontres,  
de nos congrès, de nos voyages ...*



« Saluton Karin' -  
- Sauton Petro !  
jen surprizo !... »



**espéranto**  
France-Est

la solution:

**Un cours personnalisé  
chez soi !**



**Deux maîtres-mots de notre cours  
par correspondance: rapidité, efficacité !**

- \*\*\* un matériel adapté
- \*\*\* une technique éprouvée
- \*\*\* un réseau d'animateurs performants
- \*\*\* un savoir immédiatement opérationnel

*Une diffusion  
sur toute la région  
et au-delà !*

**Edmond LUDWIG**  
26, route de la Schlucht  
**68140 STOSSWHIR**  
Tél: **03 89 77 52 56**

Nous mettons à votre disposition le site internet de notre association *Espéranto France-Est*

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

également accessible par

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vous serez informé non seulement sur l'histoire et sur la vie actuelle de notre association, mais encore sur les activités des groupes locaux, sur les initiatives des espérantophones isolés ...

et sur l'Espéranto en général ! Également à votre disposition la liste actualisée de notre « libro-servo » !

Plusieurs liens vous permettront de découvrir d'autres sites originaux en France et dans le monde.

Notre rubrique "*albums photos*", complétée en permanence, vous offrira un panorama original des événements régionaux et ... extérieurs !

**une visite s'impose !**

## résolution du congrès

Les 1034 participants venus de 35 pays de tous les continents assister au 98<sup>ème</sup> congrès mondial d'espéranto dans la capitale la plus septentrionale du monde, Reykjavik, en Islande ...

Ayant débattu pendant plusieurs séances sur le thème "*l'insularité – mais sans l'isolement: pour une communication équitable entre les communautés linguistiques*"

*Constatent* que les îles -qu'elles soient historiques, géographiques ou sociales- sont des sources fondamentales de la diversité biologique et culturelle, qui mérite d'être conservée et protégée;

*Expriment* leur inquiétude quant aux menaces de plus en plus forte contre cette diversité, en raison de plusieurs tendances homogénéisantes et destructrices dans les systèmes économiques et politiques mondiaux;

En même temps *remarquent* avec satisfaction les chances croissantes pour une intercompréhension par-delà les frontières et par-delà les cultures que donne le développement de moyens de communication tels qu'internet;

*Attirent l'attention* sur la diversité linguistique et de l'équité linguistique pour la préservation de la riche variété de cet héritage culturel que nous ont légué les îles du monde;

*Rappellent* que précisément cette protection de la diversité est une valeur fondamentale du mouvement pour la langue internationale espéranto;

*Confirment* la volonté du mouvement espérantiste de coopérer en vue d'un monde d'"insularité sans isolement", où toutes les langues et les cultures peuvent coexister et encore s'épanouir dans un respect réci-proque;

*Appellent* à une collaboration mondiale par des moyens linguistiquement équitables pour combattre les menaces de changement climatique et d'homogénéisation bio-culturelle;

*Soulignent* l'urgence d'une telle action pour conserver les trésors de notre planète insulaire.

Reykjavik, l 27 juillet 2013

=====

Ni, 1034 partoprenantoj en la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 55 landoj de ĉiuj mondopartoj el la plej norda ĉefurbo, Rejkjaviko, sur la insulo Islando,

*Diskutinte* en pluraj sesioj pri la temo "insuloj sen izoliĝo por pli justa komunikado inter lingvokomunumoj";

*Konstatas*, ke insuloj -historiaj, geografiaj ou sociaj- estas originaj fontoj de biologia kaj kultura diverseco, kiun indas konservi kaj protekti;

*Esprimas* maltrankvilon pri la nuntempe akriĝantaj minacoj al tiu diverseco, pro pluraj homogenigaj kaj detruaj tendencoj de la regantaj ekonomikaj kaj politikaj sistemoj tutmonde;

*Samtempe bonvenigas* la kreskantan ŝancon por translima kaj transkultura interkompreniĝo, kiujn donas la disvastigo de komunikaj rimedoj kiel interreto;

*Atentigas* pri la graveco de lingva diverseco kaj lingva justeco en la protektado de tiu kultura bunteco, kiun heredigis al ni la insuloj de la mondo;

*Memorigas*, ke ĝuste tiu protektado de diverseco estas kerna valoro de la movado por la internacia lingvo Esperanto;

*Konfirmas* la volon de la Esperanto-movado kunlabori cele al mondo de "insulo sen izoliĝo", kie ĉiuj lingvoj kaj kulturoj povas kunekzisti kaj plue disflori en reciproka respekto;

*Alvokas* al mondvasta kunlaboro per lingve justaj rimedoj por kontraŭstari la minacon de klimatsanĝo kaj biokultura homogenigo;

*Asertas* la urĝecon de tia agado por konservi la trezoron de nia insuleca planedo.



## Teamo por la nova vizio La nova Estraro sin prezentas

Dum la venontaj tri jaroj, la agadon de UEA gvidos sep-persona Estraro el sep diversaj landoj: tri amerikaj, tri eŭropaj, kaj unu azia. Por faciligi la kunlaboron, ni elprovas sistemon de tri subteamoj, montritaj sube.



### Prezidanto: **Mark Fettes**, Kanado

**Vivo:** Naskiĝis en 1961 en Nov-Zelando. Profesoro pri edukado en la vankuvera universitato *Simon Fraser*. Multjara sperto en UEA kiel oficisto (1986-1992), estrarano (1992-1998), kaj lastatempe kiel Komitatano B kaj gvidanto de la Komisiono pri Strategiaj Demandoj (2010-2013). Dum la lastaj 15 jaroj li ankaŭ rolis en la gvidado de *ESF*, la usona fondaĵo, kiu financis i.a. la evoluigon de *lernu.net* kaj *edukado.net*.

**Aspiroj:** Fettes volas kontribui al la modernigo kaj plifortigo de UEA surbaze de longperspektiva strategio kiu ampleksas ĉiujn agadkampojn de la asocio. Tiucele li esperas evoluigi kaj gvidi celkonscian teamon de estraranoj, komitatanoj, oficistoj kaj aliaj kunlaborantoj, emfazante bonan komunikadon, konservadon de la esencaj atingoj de UEA, kaj prudentan renovigon de niaj ideoj, strukturoj kaj agmanieroj.



### Ĝenerala sekretario: **Martin Schäffer**, Meksiko

**Vivo:** 51-jara germano, kiu ekde 2006 vivas kune kun sia edzino en Meksiko. Profesie li diplomiĝis pri publika administrado (specialaj kampoj ekonomio kaj juro). Li aktive kunlaboras en la movado ekde 1982 sur plej diversaj kampoj.

**Aspiroj:** En la Estraro de UEA li volas labori teame por plibonigi la situacion de la movado kaj modernigi ĝin. Klerigado, instruado kaj la informado estas gravaj laborkampoj. UEA havu denove gvidan rolon en la Esperanto-movado. Ni devas haltigi la falon de la membronombro de UEA.



### Vicprezidanto: **Stefan MacGill**, Hungario

**Vivo:** Naskiĝis en Nov-Zelando en 1948. Trejnita instruisto. Kunfondinto de TEJO- kaj ILEI-sekcioj en Nov-Zelando. Direktoro de la CO (1980-1984), teknika redaktoro de *Kontakto* (1978-1986), redaktoro de *Juna amiko* ekde 1986; prezidanto de TEJO (1980) kaj ILEI (1990-1992 kaj 2009-2013).

**Aspiroj:** Evoluigi koheran modulan programon de instruista trejnado (MITE). Kontribui al programo de aktivula trejnado. Verki kaj labori por krei retajn kaj irtelefonajn kursojn de Esperanto, konforme kun nuntempaj lingvinstruaj normoj. Serĉi vastan kunlaboron de ĉiuj rekonindaj agantoj en la eduka kampoj. Sume, realigi kiom eble la projektojn ĉe "Kapabligo" en la Strategia Plano.



### LEE Jung-kee, Korea Respubliko

**Vivo:** Esperantistiĝis en 1971. Magistro pri planizado. Starigis *Seulan Esperanto-Kulturcentron* en 1991 kaj nun estras. Instruas Esperanton en du universitatoj kiel docento. Eksprezidanto de *Korea Esperanto-Asocio* (2001-2004) kaj de KAEM (2008-2010). Premiito de *Premio Deguchi* (2002).

**Aspiroj:** Interkontinenta kunlaboro tra interŝanĝado de kurs- gvidantoj kunlabore kun ILEI kaj per prelegvojaĝoj. Starigi Esperanto-kursejon en la ĉefaj urboj por instrui Esperanton kaj kreskigi la membronombro de UEA. Fondi novajn landajn asociojn por tutmondigi nian movadon.



### José Antonio Vergara, Ĉilio

**Vivo:** Naskiĝis en 1962 en Ĉilio. DM kaj Komitatano B de UEA. Medicinisto, universitata instruisto. Nuna prezidanto de *ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperanta)*.

**Aspiroj:** Ĉar firme konvinkita pri la daŭra neceso de UEA kiel mondskala organiza reto de la E-fenomeno, Vergara volas kontribui al renovigo kaj strategia pliefikigo de ĝia agado, i.a. per klopodoj konstrui reciprokan senton de solidareco kaj kunidenteco inter UEA kaj la diversebenaj grupigoj ĉirkaŭ Esperanto (lokaj kluboj, regionaj federacioj, landaj asocioj, fakaj societoj, interretaj grupoj ktp).





### Barbara Pietrzak, Pollando

**Vivo:** Ĵurnalistino, profesie ligita kun E-redakcioj de *Pola Radio*, *Pola RetRadio*. Ĉefredaktoro de *Pola Esperantisto* (2012).

Ĝenerala sekretario de UEA (2007-2013), UEA-estrarano pri informado (2007-2013). Estrarano de *Pola Asocio* (2011- 2013), vicprezidanto de PEA (2013-).

**Aspiroj:** Klopodoj por kunlabori kun aliaj organizaĵoj, kiuj havas similajn kaj kongruajn celojn ankaŭ sur la landa nivelo pere de la LA-oj. Fortigo de la identecosento de ĉiuj membroj de UEA kun sia tegmenta asocio kaj logo de eksterasociaj E-parolantoj al kunlaboro por realigi konkretajn celojn. Utiligo de la potencialo, kiun reprezentas individuaj membroj en la funkciado de UEA.

### Stefano Keller, Svislando

**Vivo:** Diplomita instruisto, psikopedagogo (ELTE). Aktiva esperantisto ekde 1970. Estinta sekretario de UMEA. Diplomita E-instruisto (*Cseh-metodo*), metodologo (*Kultura Centro Esperantista*, La Chaux-de-Fonds, 1980-aj jaroj). Kunfondinto de *Junularo Esperantista Svislanda*.

Poresperanta aginto en Srilanko. Sekretario de *Svisa E-Societo* (2006-2013). Kunlaboranto en *CDELI*. Estrano de UEA, ĉef-reprezentanto ĉe UN, Ĝenevo.

**Aspiroj:** Kreskigi la prestiĝon de UEA kaj de E-o en internaciaj organizaĵoj, akiri influajn rolojn en NRO-oj. Firmigi la statuson de UEA kiel defendanto de lingvaj rajtoj. Prezenti konkrete E-on kiel justan alternativon al la komunikada situacio tutmonda. Esplori eblojn pri interagoj kun la ekstera mondo, novaj okazoj, agadmanieroj, strategioj efikaj por konkretaj paŝoj. Profesiigo de la laboro. Plifortigo de kunlaboro inter komisiitoj de UEA.

La Estararo aktivos pere de tri subteamoj:

- 1 Mastruma:** Fettes (gvidanto), Schäffer, LEE, MacGill. Traktos financon, membraron, kongresojn, regularojn, organojn, delegitojn, rilatojn kun la CO, kaj aliĝpetojn de landaj asocioj.
- 2. Monda:** Keller (gvidanto), Fettes, Pietrzak, Vergara. Traktos rilatojn kun UN, Unesko, kontinentaj instancoj kaj neregistaraj organizaĵoj; kaj plie strebos prezenti nin ekstermovade, kio inkluzivas la starigon de Tutmonda Inform-Reto (TIR).
- 3. Movada:** MacGill (gvidanto), LEE, Pietrzak, Vergara. Intensigos rilatojn kun la landaj kaj fakaj asocioj, kun la regionaj komisionoj, E-centroj kaj aliaj agantoj, cele al realigo de projektoj en la kampoj Konsciigo, Kapabligo kaj Komunumo, kiu inkluzivas kulturon.

## Universitata filmita kurso

"Enkonduko al astronomio kaj astrofiziko" - en Esperanto!



En la pasinta jaro *Amri Wandel*, profesoro pri astronomio en Universitato de Jerusalemo, faris Esperant-lingvan prelegserion en kadro de la "*Pekina Esperanta Astronomia Kurso-2012*".

En la studio de la *Ĉina Radio kaj Televido* estis faritaj 12 prelegoj, ilia daŭro estis sume ĉirkaŭ 40 studhoroj, kaj pri ili estis faritaj filmaj registraĵoj, kiuj ekde nun **estas libere spektblaj en interreto** (post la komenca 10-sekunda ĉina reklamo).

Tiu videa kurso estas modelo-dona ne nur pro tio, ĉar la interesan astronomian fakan enhavon povas utiligi stud-entoj ie ajn en la mondo, sed ankaŭ pro tio ĉar ĝi montras unu eblan vojon por reala kaj faka aplikado de Esperanto.

Gratulon kaj dankon al la organizantoj pro la realigo, kaj ankaŭ al Amri Wandel pro la prelegoj!

Urloj (www-adresoj) de ĉiuj 12 partoj de la filmo estas troveblaj en la priastronomiaj paĝoj de *Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB*:

<http://www.eventoj.hu/steb/astronomio/index-astronomio.htm>

# Antaŭkongreso tra suda Islando

Antaŭ la kongreso en Rejkjaviko estis proponita de UEA antaŭ-kongreso al la suda parto de Islando, al akvofaloj, glaĉeroj kaj vulkanoj.

La 15an de julio, ĉe la internacia flughaveno de Keflavik jam atendis aŭtobuso por veturigi la turistojn al la centro de Rejkjaviko je 50 km. Kaj de tie al diversaj hoteloj. La partoprenantoj al la antaŭkongreso rendevuis en la hotelo Klöpp.

Tuj eblis konstati la drastan diferencon de klimato, dum en Francio estis pli ol 30 gradoj, tie necesis pli varmajn vestaĵojn, ĉar la temperaturoj variis inter 8 ĝis 14 gradoj, krome la vento pliigis la senton de malvarmo. Certe temis pri vere norda lando.

Jam en tiu vespero tuj kreiĝis agrabla Esperanto-etoso kun konatoj el diversaj landoj.

La postan tagon komenciĝis la veturado unue tra senhomaj pejzaĝoj, kun kelkfoje iom da ŝafoj kaj ĉevaloj. La aŭtobuso atingis la akvofalon Skógafoss. La naturo estas grandioza kaj impresiga kun vastaj spacoj, kun malmulte da kreskaĵoj. Legomoj kaj fruktoj estas kultivataj en forcejoj.

En 2010 erupciis la islanda vulkano Eyjafjallajökull. Tie troviĝas familia vizito-centro, kiu montras 20-minutan filmon pri tiu natura katastrofo kaj ties konsekvencoj. Rompitaj pontoj kaj stratoj, tegmentoj plenaj je nigra cindro, sed poste la grundo ricevinte la vulkanajn cindrojn fariĝis ege fekunda. Islandanoj ŝajnas iel optimismaj.



akvofalo Skógafoss.



Islandaj pejzaĝoj aspektas tute sovaĝaj, sed allogaj por multaj birdospecioj. La plej simbolaj el ili estas fraterkuloj, kiuj abundas sur iuj montoj kaj rokaĵoj.

Ŝajne en la montaro kaj eble eĉ en la rokaĵoj loĝas la islandaj troloj. Certe ili ne estas videblaj, eble pro teruraj aspektoj. Tamen necesas respekti ilin kaj ne iel ajn formovi ŝtonegon. Nevideblaj troloj, tamen jen unu fotinda.

La turistoj abundas en iuj lokoj por ĝui la montaron, la sovaĝan naturon.



La manko de arboj kaj ĉefe de arbaroj igas la montaron nuda kun multaj rokaĵoj.

En la maro restas rokaj insuloj kun diversaj nomoj, laŭ la formoj.







En la posta mateno la aŭtobuso veturis pli ol 60 km por atingi la nacian parkon Skaftafell. Survoje videblis tia senhoma pejzaĝo, sternita de lafo-ŝtonoj nun kovritaj de verdaj likenoj. Tie, nenia besto paŝtiĝis, nenia konstruaĵo, nur la strato kun malmulte da trafiko, kvazaŭ longa rubando en ia dezerto.

Sed jen proksimiĝante al la nacia parko, eblis konstati drastan ŝanĝon de la pejzaĝo. Akvofaloj, iom da konstruaĵoj kaj eĉ kultivitaj kampoj.



Tuj apude troviĝas la plej granda glaĉero de Eŭropo, Vatnajökull. La laguno Jökulsárlón montras mirindajn vidaĵojn al la turistoj. Tie flosas enormaj glacimontoj. Malrapide la glaci-blokoj malsupren-ŝoviĝas de la glaĉero kaj falas en tiun lagunon. Grizaj tavoloj rilatas al vulkanaj sabloj post erupcioj.

En la centro Þórbergssetur en la bieno Hali, kie troviĝas ekspozicio dediĉita al la fama kaj renoma islanda verkisto kaj esperantisto Þórbergur Þórðarson.

Tie troviĝas restoracio, kie estis servitaj tre bongustaj fiŝaĵoj. Apude troviĝas muzeo kun ekspozicio.

Malantaŭ la konstruaĵo, grandegaj libroj de tiu islanda verkisto. Sur la kvara libro estas skribita "Esperanto".

Nia grupo de ekskursantoj staras por komuna foto.



Þórbergur Þórðarson (naskiĝis la 12-an de marto 1888 en sudorienta Islando; mortis la 12-an de novembro 1974 en Rejkjaviko) estis islanda verkisto. Li ankaŭ estis eminenta esperantisto, kiu longe batalis por la internacia lingvo en Islando. Inter alie li eldonis tri esperantajn lernolibrojn kaj unu grandan propagandan verkon por Esperanto.

**VARMA**  
The Warmth of Iceland  
100% PURE NEW WOOL

**VARMA** islanda marko por varmaj vestaĵoj el lano.







Islando estas kvazaŭ Usona insulo, kie oni uzas la anglan kaj diligente flegas la lokan islandan lingvon. Jen aŭto-haltejo post la vizito al la laguno Jökulsárlón. Vatnajökull estas la nomo de la glaĉero. Apude staras la ĉarma interpretistino Siru Laine el Finnlando loĝanta jam 7 jarojn en Islando.

Dum la tria tago pluvis, tamen la aŭtobuso veturigis la ekskursantojn laŭlonge de la suda marbordo al la haveno Landeyjarhöfn. Tie per pramŝipo estis planita veturi al la insulo Heimaey, la plej granda de la insularo Vestmannaeyjar, konsiderata la Pompejo de la nordo pro la detruo de duono de la vilaĝo sur la insulo, kaŭze de erupcio de la vulkano Eldfell.

En muzeo pri la nordaj birdoj troviĝis eĉ vivanta eta fraterkulo, kiun la vizitantoj povis preni al siaj manoj kaj iom karesi.



Jen la aspekto de la haven-urbeto de la insulo Heimaey. Fone monto tute proksima al la haveno.

Estis planite viziti la muzeon pri vulkano kaj ties erupcio en 1973 kaj poste piede grimpi al la vulkano mem. Tamen tiam terure pluvis.



### Iom da historio

**la 23an de januaro 1973** erupciis la vulkano en Heimaey.

**la 31an de januaro** la cindro-tavolo atingas 4 metrojn da alteco. Tegmentoj rompiĝas pro la pezo.

**la 9an de februaro** la surfaco de la insularo Vestmann grandiĝas je 2 kvadrat-kilometroj

**la 20an de februaro** la vulkano fendiĝas en du partoj, unu nomata "Vagabondo", miloj da tunoj direktiĝas al la haveno je 25 metroj hore.

**la 22an de marto** la lafo progresas je 40 metroj hore. 70 domoj estas detruitaj

**la 26an de marto** la vulkano refoje fendiĝas en du partoj kaj direktiĝas al la nordo

**la 1an de aprilo** la lafo ĉesas flui. La erupcio daŭris 5 monatojn kaj 10 tagojn.



Tiu akvofalo Faxi estas unu el la plej pitoreskaj en Islando. La rivero estas ankaŭ salmrivero. Maldekstre de la akvofalo troviĝas speciala ŝtuparo por salmoj. →



Jen tute aparta islanda batal-sporto, nomata "Glima". Ambaŭ luktantoj tenas la kontraŭulon ĉe lia speciala kalsono. Tiam la luktado komenciĝas kvazaŭ en duopa danco, dum la celo estas faliĝi sian kontraŭulon. ↓

Iuj gejseroj ŝprucigas varman akvon, ĝis ĉirkaŭ 30 metrojn da alteco. La gejsero Strokur pli ofte ŝprucigas, tamen ne tiom alte. →



La Nacia Parko Þingvellir (tingvellir), troviĝas en la Unesko-listo de naturaj heredaĵoj. Ĝi situas apud la plej granda islanda lago kaj geologie aparte interesa, ke tie apartiĝas la du kontinentaj tekto-platoj de Ameriko kaj Eŭropo, tiel ke Islando grandiĝas ĉiu-jare je 2 cm. ↓

La roka muro laŭlonge de la rivero montras kelkfoje tute apartan formon. Ĉu la malgranda roko falos aŭ ne??



En tiu la Nacia Parko fondiĝis en 930 la Althing, la parlamento de Islando. Ĝi estas unu el la plej malnova ankoraŭ aktiva parlamento en la mondo. Ĝi havas profundan historion kaj simboles signifon por la popolo de Islando.

Nuntempe la Althing estas la parlamento de Islando. La sidejo troviĝas en la Alþingishúsið en Rejkjaviko. La parlamento havas 63 anojn elektitaj ĉiun kvaran jaron. La strukturo de la nuntempa Althing estis starigita la 1-an de decembro 1918, kiam Islando iĝis sendependa ŝtato disde Danio. Post la okupado de la aliancanoj dum la dua mondmilito, la 17-an de junio 1944, Islando iĝis respubliko.



## La 98-a UNIVERSALA KONGRESO EN REJKJAVIKO 20-27.7.2013



Jam la duan fojon okazis Universala kongreso en Islando. Laŭ pluraj tiamaj partoprenantoj la lando multe ŝanĝiĝis. Ĉi-foje la kongreso okazis en mo-

demna vitra konstruaĵo "Harpa", kiu estas centro por koncertoj kaj konferencoj. La partoprenantoj loĝis en apudaj aŭ en pli foraj hoteloj. Rejkjaviko estas la plej norda ĉefurbo en la mondo. Inter kelkaj vidindaĵoj ĉe la marbordo okulfrapas brilanta ŝtala ŝipforma artaĵo, kiun admiras preterpasantoj. Iom pli fore troviĝas la domo Höfði, kiu famiĝis pro subskribita kontrakto inter la usona prezidento Reagan kaj la rusa Gorbaĉov por malarmiĝo. La domo de la urbo estas la plej alta preĝejo Hallgrímur.

La kongreson partoprenis pli ol mil esperantistoj el 55 landoj. Sabate, la 20-an de julio posttagmeze la ĉina delegacio prezentis agadojn de "Ĉina Kulturo en Norda Eŭropo". Estis instalita vasta fotoekspozicio. Oni povis admiri kelkajn artaĵojn: kajtoj, papereklondadoj, brodaĵoj kaj aliaj. Post la solena ceremonio, kiun ĉeestis ĉinaj kaj islandaj altranguloj oni malvalis buston de Konfuceo donacitan al la Islanda-Ĉina Asocio por kulturaj interŝanĝoj inter la du landoj. La sekvan tagon estis okazigita la "Ĉina Tago" de la ĉina E-ligo. Dum ĝi oni prezentis diversajn aktivaĵojn el pasintaj jaroj kaj faris komentojn pri "Kultura diferenco inter la okcidento kaj oriento". Sabata vespero apartenis al la Movada Foiro, dum kiu oni renkontas multajn konatojn kaj povas ekscii pri la aktivaĵoj de diversaj E-asocioj.

La solena inaŭguro de la kongreso okazis dimanĉe la 21-an de julio. Lastan fojon prezidis ĝin kaj bonvenigis la partoprenantojn kaj


honorajn gastojn la prezidanto de UEA Probal Dasgupta. La plej eminenta inter la ĉeestantoj estis la ŝtatestro de Islando s-ro Olafur Ragnar Grimsson, kiu alparolis la publikon kaj deziris sukceson al la kongreso. Lia parolado estis varme aplaŭdata. Claude Nourmont legis la mesaĝon de Luis C. Zaleski-Zamenhof - la nepo de nia Majstro. Sekvis salutoj kaj bondeziroj de diversaj asocioj kaj landaj reprezentantoj. Dum la paŭzo estis prezentita mallonga desegnofilmeto kaj pianmuziko. Posttagmeze jam komenciĝis serioza programo kun diversaj prelegoj kaj asociaj kunvenoj.

La Komitato de UEA elektis tri novajn Honorajn Membrojn de UEA. Dum la dua kunsido de la komitato estis elektita nova estraro kun prezidanto Mark Fettes el Kanado. Oni atendas ŝanĝojn kaj novan strategion. UEA akceptis la 71-an landan asocion - la Albanan E-Asocion. En la Fermo de la kongreso estis anoncita la decido de la antaŭa estraro de UEA pri la aljuĝo de Trofeo Fyne al Vjetnama Esperanto-Asocio. La nova prezidanto Mark Fettes transdonis ĝin al vjetnama junulino.

La kongresa programo estas ĉiam bunta, multaj programeroj okazas samtempe, do foje malfacilas elekti. Dum la semajno







okazis diversaj prelegoj, konferencoj, diskutrondoj. Multaj asocioj havis okazon prezentiĝi kaj kundiskuti. Sian kunsidon havis instruistoj, fervojistoj, medicinistoj, juristoj, sciencistoj, vegetaranoj, ateistoj, komunistoj, SAT-anoj, ĵurnalistoj, verduloj, kat-amantoj, nefumantoj, blinduloj, radioamatoroj, komercistoj, samseksamuloj, legantoj de Esperanto kaj aliaj. Prezentiĝis pluraj religiaj asocioj pri: Kristanismo, Spiritismo, Ŭombulismo, Oomoto. La kongresa temo "Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvokomunumoj" estis pritraktita dum la kongreso.

Ankaŭ en la ĉi-jara UK ne mankis tradiciaj programeroj, kiel ekzemple: Kleriga Lundo, Tago de la Lernejo, Centra Oficejo Respondas, Aŭtoraj duonhoroj, Aŭkcio, Oratora Konkurso, Belartaj Konkursoj, Ekumena Diservo, Ĝemelaj Urboj, tradicia urba akcepto, prezento de venontaj UK-oj. Kunsidis Akademio de Esperanto, komitato kaj subkomitatoj, faka kaj strategia forumoj. Okazis serio da paroligaj lecionoj, oni povis iom lerni la islandan lingvon kaj sekvi prelegserion pri Islando. Allogis kurso pri la historio de Esperanto. Kongresanoj ĉeestis multajn aliajn interesajn programerojn. Aperis kvin numeroj de la kongresa kuriero "Aŭroro". Ĉiuvespere ni ĝuis kulturajn prezentaĵojn. La ĉeftrupo prezentis teatraĵon bazitan sur la dramo de Karel Čapek "RUR" - temas pri robotoj. Emocia estis violonludado de Sara Su Jones, usona denaska esperantistino, kiu kiel



trijara knabino unuafoje sursceniĝis kaj ludis violonon en la 63-a UK en Varna en la jaro 1978. Jam tie ŝi rikoltis fortajn aplaŭdojn kaj admiron. Sian artan altnivelan pianludadon elmontris s-ino Alaniz el Argentino. Koncertis ankaŭ konataj E-muzikistoj, inter kiuj Kim el Danio, Emanuĉel el Italio, Ĵomart kaj Nataŝa el Svedio, Edgar Piŝĉikas el Litovio.

Ne mankis KER-ekzamenoj, IKU-prelegoj, AIS-kursoj, bankedo kaj balo, nacia vespero en kiu islandanoj prezentis sian landon kaj kulturon. Impresis korusa kantado sur ŝtuparo antaŭ la grandega E-flago por plezuro ne nur de esperantistoj. La internacia vespero ĉiam konsistas el kontribuoj de la partoprenantoj. Aŭskultiĝis kantoj, poemoj, pian- kaj flutludado. Oni spektis teatraĵeton kaj dancojn. Ĉe la fino prezentiĝis ĉiuj artistoj komune kantante dum juna hungaro Ĉaba Slezák pianludis.



Tre variaj estis ĉiutagaj ekskursoj, dum kiuj ni ekkonis vidindaĵojn de la ĉefurbo kaj admiris ĉirkaŭaĵon de nekutima, foje lunaspekta, pejzaĝo. Ravis neĝkovritaj montaroj, riveroj, multnombraj akvofaloj, vulkanoj, rokoj, gejoj, lafokampoj, azuraj lagunoj kun varma akvo, lagoj, flosantaj grandaj glacipecoj, vaporfontoj, paŝtigantaj ŝafoj kaj multaj ĉevaloj de speciala raso. Oni donis al ni multajn informojn pri la lando, ĝia historio, sagaĵoj, pri geoterna energio kaj uzado de varmaj fontoj, pri kaprica ĉiunomente ŝanĝiĝanta vetero kaj pri multaj aliaj interesajĵoj. Ni eksciis, ke ekonomio baziĝas ĉefe je fiŝkaptado, turismo kaj prilaborado de aluminio. Islando estas multifaceta lando kun kuraĝaj homoj, kiuj devas alfronti malfacilan vivon en ne tre favoraj kondiĉoj, ĉefe en iuj internaj perditaj lokoj. Ĝi estas mirinda lando, kie eblas tuŝi glaĉerojn, neĝon kaj nubojn transformiĝantajn en densan nebulon.

En unu paĝo ne eblas detale priskribi ĉiujn aktivajĵojn, eventojn kaj belajĵojn. Oni mem devas sperti la Universalan kongreson. La venontjara okazos en Bonaero la ĉefurbo de Argentino. La 100-a jubilea en Lille en norda Francio en la jaro 2015. Estas sufiĉe da tempo por ellerni Esperanton kaj partopreni ilin.

Fotoj de Liba kaj Andreo

Liba Gabalda





... il y a 100 ans ...  
antaŭ 100 jaroj

24an de aŭgusto 1913

Antaŭ cent jaroj, la 24an de aŭgusto 1913, en BERNO, estis malfermita la  
**9a Universala Kongreso de Esperanto.**




Okaze de ĉi tiu datreveno, en la novaĵretejo *La Balta Ondo*, aperis artikolo de Andreas Künzli pri la 9a UK, origine publikigita en la ĵus presita duobla postkongresa kalendaro de *La Ondo de Esperanto*.

... Honoris memkompreneble la solenan malfermon Dro Zamenhof kaj lia edzino Klara. Akompanis la paron la filino Lidja, freŝbakita lernantino de la lingvo, kaj Adamo, la filo, kiu alvenis el Laŭzano, kie li studis medicinon. Inter la 1203 partoprenantoj ( el 30 landoj ), multaj bedaŭris la decidon de Zamenhof, kiu rezignis por la unua fojo pri sia propra kongresa parolado. Multaj ankaŭ ne revidos lin. Li ja mortis la 14an de aprilo 1917. La sekvanta UK okazos en 1915 en San Francisco. Enpartoprenos 163 homoj ...

La tutan interesoplenan elvokon de la Bern-evento niaj legantoj malkovru je la suba ret-ligo

<http://sezonoj.ru/2013/08/227bern>



NB - el la redaktejo:

Sojle de, kaj en la dua mondmilito, pereis preskaŭ la tuta familio Zamenhof.

Jam nur kelkajn tagojn post la nazia invado de Pollando en septembro 1939, *Adamo* Zamenhof estis arestita, kaj en januaro 1940 mortpafita. *Sofia* kaj *Lidja*, filinoj de Zamenhof, kaj *Ida*, lia fratino, estis gasumitaj en *Treblinka* en 1942. *Wanda*, la edzino de Adamo kaj ŝia filo, mirakle eskapis lastmomente, kaj supervivis la militon, kaŝite interne de Pollando sub la falsa nomo de "*Krzysztof Zaleski*", nomo, kiun la tiama adoleskanto konservis poste, memorante pri la tiama malfeliĉaĵo.

## pli ol indas malkovri tiun aparte allogan landon ! ...

Kiam nia samideano Bardhyl, invitita gasto de la orientfranca asocio dum la "aŭtuna" staĝo, majstre prelegis pri sia lando, kelkaj scivolemuloj sentis la nepran deziron konatiĝi kun tiu grava parto de Eŭropo, longe "ŝlosita" al turrismo.

Post studado de multfaceta fak-dokumentaro kolektita, post preparo de la necesaj vojaĝ-bagaĝoj, ekis la sopirata flugo ĝis Tirana, la ĉefurbo, kun itinero super la okulfrapa Alpo-panoramo, punktita de fulma halto en Romo.

Jen la bonveniga rideto de Bardhyl, nia gastiganto, kaj varma interkizado por plenplene ĝojigi la etoson ! Ekstere, pacience atendas Artur, speciale elektita taksi-ŝoforo, kiu rapide iĝos ŝiaflanke kaj siamaniere ŝatata amiko ! Nia iom ebriga "aventuro" komencis !

Memevidente ne eblas "raporti" en tri paĝoj, okul-kaj menstrafe, la eksterordinaran "vagabondadon", kiun ni estus travivontaj ! Jen nun kelkaj sekvencoj, zorge elektitaj kaj ĉerpitaj el nia tag-albumo, por vekti ĉe niaj legantoj la deziron ĝui la saman plezuron ...



nacia, historia muzeo

lo "Freddys" !...

Trafa ideo unue supreniri lifte ĝis teraso de rotacia restoracio, en la "centro", el kiu ampleksa panoramo de la urbo tradukas ĝian modernan aspekton kaj daŭran ellaboradon de novaj kvartaloj !



moskeo Et'hem bey

diaŭa ŝtato kondukas toler-maniere je la diversaj religioj.

Stranga "monumento" tikletas nian scivolemon ... Temas pri la iama muzeo *Enver Hoxha*. Post la malapero de la komunista diktaturo, ĝi devus esti detruita sed momente ĝi rolas kiel diskoteko.

Memkompreneble la albanoj emfazas pri *Skanderberg*, fama heroo, kiu memorigas pri la rezisto al tiama invado de la otomanoj. Impona statuo tronas meze de vasta placo. Ironio de la historio... malaperis statuo de la diktatoro, kiu staris sur la sama placo !



lama "muzeo" Enver Hoxha

"ekstere"... Halto en urbeto *Krujë* kun rimarkinda etno-muzeo instalita en riĉa domo de iama nobelulo, kiu najbaras je muzeo dediĉita al *Skanderberg*. Sekvos malkovro de *Durrës*, kun lokaj postrestaĵoj de la ĉeesto de Romianoj, interalie amfiteatro por 20 000 spektantoj. Jen okazo de la tute pkosima plaĝo por delektiĝi je pli ol bongusta fiŝaĵo.

Dum du tagoj, akompanataj de nia sperta ĉiĉerono, kiu konas sian ĉefurbon pli detale ol iu kutima gvidlibro, ni kviete laŭiros stratojn kaj placojn de Tirana, kies bildojn komencos riĉigi la fak-albumon de scivolemaj turistoj !


Ni danku al Bardhyl, kiu ellaboris kompletan programon de vizitoj laŭ niaj deziroj, kaj sekve, ĉiumatene, kaptos nin en la hote-



placo Sanderberg kaj Palaco de la Kulturo

Dum niaj aluditaj pied-promenadoj, menciindas aparta halto en la tre riĉa, *nacia, historia muzeo* kun belegaj mozaikoj ... Sama okul-ĝuado en *la muzeo de la belartoj*, kie ni malkovros interalie pentraĵojn de la albanaj impresionistoj, galerio kiu najbaras kun verkaĵoj el la epoko de la socialista realismolismo ...

Funkciis plurfoje la fotilo cele memorigon de religiaj konstruaĵoj. Ni nur citu la moskeon *Et'hem bey* kaj la tutmodernan katedralon "*Mère Teresa*". Ĉi-tie necesas aldoni, ke la ho-



katedralo "Mère Teresa"

Antaŭ ol "migri" ekster de la ĉefurbo, ni aprezis inviton de *Shaban Hasani* kaj edzino, kun kiuj ni agrable konversaciis pri diversaj temoj. Bardhyl inkludis ankaŭ saluton al *Ylljet Aliĉka*, malnova ambasadoro en Parizo, kies pluraj verkoj estas tradukitaj esperantlingven.

Nu, nia gastiganto deziras "kroni" du plenplenajn tagojn da esplorado, elektante atingon telfere de la Mont *Dajti* -1600m-... Denove superba panoramo de Tirana sub blua ĉielo ! Bonveniga ankaŭ refreŝiga trinkaĵo !

**21an de junio** - Ek de nun, Artur, nia elstara taksi-stiranto iĝos siavice ne anstataŭigebla ĉiĉerono, mirige sperta je gesta lingvo ! Unua vizito





**Berrat** - la "urbo je 1000 fenestroj"

*Durrës*, por konstati la iom anarkian kaj "galopantan" domkonstruadon rande de alloga plaĝo. Tre agrabla strateto ĝis industria zono, kie ni jam konstatas etoson de gaja agitado pro la morgaŭa balotado ... Miksiĝas hupadoj, petardumadoj, "flugantaj" veturiloj ĉirkaŭitaj je kolor-rubandoj, kies okupantoj svingas flagojn je la koloro de siaj kandidatoj !

23an de junio - "Ripoztago" ... Ni tamen vizitos la kastelon de *Petrelä*, aŭdace starigita sur rok-sprono. Facilas imagi ĝian rolon de defend-lokon dum la atakoj de la otomanoj... Tiam organizis la reziston *Mamika Kastrioti*, fratino de *Skanderberg* !

Por la du sekvantaj tagoj, Bardhyl oportune planis itineron direkte al *Sarandë*, "la riviera albanaise", franca esprimo, regiono pri kiu fieras la lando ! Sed jam densa programo komence de la ekskurso ... Lagunon de *Karavasta* kaj ties pelikanojn ni malfacile malkovros. Eta incidento solviĝis dank' al dikmuskolaj brakoj, kiuj eltiros la taksion el humida sablo !... Ankaŭ fulma la halto en *Ardenica*, lasta monastero, kie daŭre loĝas kelkaj monaĥoj. Jen *Apollonia* kun imponaj ruinoj romiaj. Jen suprenveturado, ne al la "infero"... sed al la "paradizo" de la mont-pasejo *Lliogara*, 1027m, kie oni dezirus igi birdo por lasi sin ŝvebi ĝis la mirinde blua maro, tute malsupre ! Kiel, kiom belas ! Tutsame ĝuinda la vojo, kiu je ĉiu kurvo rivelas novan surprizon, novan okul-frapan "bildon" !



**Saranda** - foto kaptita el la kastel-ruinoj

kajn domojn kaj diversajn, ampleksajn monumentojn ... Teatro, banejoj, baziliko, impona urb-pordego, fortreso, kies bildoj ŝoviĝas en la fotilojn de mirigitaj turistoj. Tute prave Butrint kuŝas en la listo de la tutmonda heredaĵo de UNESKO.

Meritita halto en *Gjirokastër*, ankaŭ sur la supra listo. "Otomana urbo" zorge konservita, kie denove ni konatiĝos kun glitiga, trikolora pavimaron por ĝui belan vidpunkton el la citadelo. Anekdote, la naskiĝdomo de *Enver Hoxha* strange detruigis en 1997 !

Jen itinero, sub 30°, kiu vere satigis nian kultur-scivolemon.

26an de junio - Nova, dutaga veturado diligente plenumota de nia fidela Artur ! Tra *Elbasan*, ankaŭ vizitinda, ni atingos la pasejon de *Thanes*, kiu ebligas superban malkovron de la lago *Ohrid*, la plej

La morgaŭon, veturadon suden ĝis *Berat*, en kiu abundas vizitindaj lokoj; ni citu la "*kalaja*" -kastelo en albana lingvo- memevidente, la tradician etnomuzeon, sed ĉefe mirinda ensemblo de domfasadoj, kiu famigas la "*urbon je 1000 fenestroj*" !. La tre, tre malnovajn, glatigitajn pavimarojn venkos lerte la veturilo de Artur por atingi la antikvan citadelon, en kiu daŭre vivas kelkaj privilegiuloj, ĝuante kvietecon kaj freŝecon. Ĉu ne mencii iun lokan specialaĵon el ŝafaĵo, gustumita en la "*castle park*" ? Reveno al la ĉefurbo tra diversspecaj pejzaĝoj kaj fulma halto ĉe la marbordo sude de



**Kastelo de Petrelä**

Sed ni bedaŭrinde forlasos tiujn idiliajn pejzaĝojn, ĉar atendas nin la hotelo, la strat-svarmo de la banlokaj urboj ... Ekdormo kun okuloj plenplenaj je kolorbildoj de la hodiaŭaĵo, naturspektaklo !

25an de junio - "*Kalaja*" de *Saranda* ... Pli ol miriga ! Ĉiuj fotiloj aktivas, vidiĝas la "bolanta" urbo-golfeto. Stariĝas rapide ĉiustilaj dom-ensombloj en perfekta anarkio, naskiĝas iuspeca "turist-uzino" en ĉi-tiu angulo de paradizo... Bedaŭrindaĵo ! Ĉirkaŭe, piede de montĉeno, diversaj kultivejoj kolorigas riĉan kamparon, kaj ĉe la horizonto, la maro mirinde blua. Oni imagas tute proksime la insulon de *Corfou* ... Sed ni forlasas tiun ĉarman "feriejon" por atingi, preskaŭ ĉe landlimo de Grekio, unu el la plej famaj vidindaj ejoj de Albanio ! *Butrint* ja ofertas al siaj miloj da vizitantoj pli ol okul-frapajn ruinojn de la sukcesintaj civilizacioj, kiuj konstruis tie aŭtenti-



**Butrint** - amfiteatro ... Jen Artur, fidela ŝoforo !



"malnova" el la mondo, kun la lagoj *Titicaca* kaj *Baikal*. Ĝi konkretigas landlimon inter Albanio kaj Makedonio. Su de, jen *Pogradec*, banloka urbo kie ni tranoktos. Ĝuinda etoso de moderna urbo, kiun parton ni vizitos sub la gvdado de emerita esperantisto, *Gjergji Gusho*.



**Pogradec - longe de la plaĝo**

Tie ni frandos la faman "koran" (*Ohrid-truto*).

Kial rezigni pri trapaso de la proksima landlimo por atingi la pilgrimejon de *sankta Naomi*, parte piede, post du haltoj ĉe fak-giĉetoj landlimoj ... per alia veturilo, ĉar Artur ne posedas la necesan legiitimilon !

Svarmas turistoj, rande de la vojeto butikoj pri religiaj memoraĵoj, ĝis la monastero tra kies aleoj paradadas libere... pavoj !

27an de junio - Frue, post solida matenmanĝo en la "internacia hotelo", ni ekveturas direkte al *Korĉë*. Nova etoso "duon-komunista" (la iama diktatoro estis tie lernanto kaj profesoro pri ... franca lingvo), "duon-orienta" (fulma trapiedumado de iama "karavanejo").

Unue menciinda la granda, plenaera bazaro sur la granda placo, kiu proponas "ĉion", novan aŭ duonuzitan ! Subita bildo en nia memoro, la plenaera ĉio-vendejo en *Sarmarkando* !

Memkompreneble, vizito de ortodoka preĝejo, de la "orienta" muzeo ... sed kun surprizo, malkovro de la muzeo de la latina alfabeto, trudita al la lernantoj en... 1887 !

Rapida piedpreterirado flanke de la renovigata moskeo. Anekdote: surlokaj laboristoj de turka skipo forlasas momente sian tagmanĝon por surge nuiĝi sur tapiŝon ... sur la herbo ! Laŭtigis ja psalmokanto de la muzeino !

Spite al la minaca pluvofalo, ni deziras atingi *Voskopojë*, 1200m, kiu laŭinforme famas pri siaj preĝejoj. Nia alveno, tagmeze, okazas dum plena strat-renovigo ! Artur manipulas lerte sian stirilon por ne difektigi la veturilon ! Densiĝas la pluvo, malsukcesas malkovro de la menciitaj preĝejoj; ni prudente rezignos kaj tagmanĝos en tutnova, tipa restoracio, satigante nian apetiton je pli ol bongusta ŝafaĵo !



**Korĉë - Memore al la ek-uzo de la latina alfabeto**

Reveno sub pluvo al la ĉefurbo ...

Vendredon la 28an – Du urboj en la vizit-programo, *Lezhë* kaj *Skodër*, ambaŭ nord-okcidente, ĉe la landlimo de Montenegro kaj sude de la plej alta montaro de Albanio, 2694 metrojn ... Suprenirado ĝis la kastelo de la unua ofertas, kiel supozite, revan rigardon super la ebenaĵo, la urbo, la maro kaj la montaro de la ĉirkaŭaĵo. Sed, kiel en *Saranda*, la impet-deziro konstrui domaron ne konas limon, kaj stariĝas feri-apartementoj en granda malordo ... kel antaŭ 50 jaroj ĉe la hispana *Costa Brava*, apartementoj, kiuj hodiaŭ ne plu trovas aĉetantojn ! Ni bondeziru sukceson al tiuj konstruaĵoj ! Sama fenomeno ekzistas en pluraj landoj eskapantaj el la komunismo, kiel ekzemple en *Bulgario* rande de la Nigra Maro.



**Amika babilado kun Gjergji Gusho**



**Korĉë - Plenaera "bazaro" !**



**Skodër - granda aleo por piedirantoj**





Skoder - larĝa aleo por piedirantoj

Skoder ĉarmos nin pro la impona fortreso kaj la tute nova alloga centro por piedirantoj.

29an de junio - Dutaga ekskurso per buso kies celo estas la urbo *Bajram Curri* nord-oriente de la lando. Akompanas nin fidela Bardhyl, ankaŭ elstara ĉiĉerono ! Komforta aŭtovojo, tra mirinda montpejzaĝo ! La aluditan urbon ni atingos traveturante parton de *Kosovo*, sen iun ajn malfacilaĝo ĉe la landlimo ! Sed mallagraba pluvo fuŝos la malkovron de tiu mirinda montpanoramo ... Ni tamen povos ĝui spektaklon de mallarĝa rivero, strangolita inter du rokmuregoj ... Jen la aŭtentika albana montaro, kiun ni sopiris admiru sub la suno !



valo de *Valbona*



Bardhyl retrovas ŝatatan pejzaĝon

30a de junio - reveno ĝis *Prizren*, kaj kontakto kun parencoj de Bardhyl ... Jen okazo pruvi la nepran utilecon de esperanto !

Lasta vespero en Tirana, kun pli ol amika kunĉeado en la restoracio *Gloria*, dum kiu ni tutkore dankas niajn sindonemajn gastigantojn, pro la sukceso de mirinda "aventuro", kiun ni plenplene ĝuis dum du semajnoj !



Përzemërt ju falënderoj për të dy prej jush dhe Artur



Pol DENIS

## Albanio en la UEA-familio



agema skipo de la nova asocio

*Albana Esperanto-Asocio* fariĝis la 71-a landa asocio de UEA.

La Komitato akceptis ĝian aliĝpeton kun 37 voĉoj por, neniuj kontraŭ kaj unu sindeteno.

Albana Esperanto-Asocio fondiĝis en 1991 kaj komence nomiĝis *Albana Esperanto-Ligo*. Ĝia prezidanto estas inĝeniero **Shaban Hasani**.



*Esperanto France-Est* amike tostas ĉe gesamideanoj **Hasani**





## Herzberg - am - Harz die Esperanto-Stadt la Esperanto-urbo



gastigis  
la 46-an Konferencon de ILEI  
12 / 18-ajn de julio 2013

Internacia Ligo  
de  
Esperanto  
Instruistoj



" ...Unue impresis min la fakto, ke 22 nacioj partoprenis kun entute 75 partoprenantoj. ( Ĉar mi ne kalkulas la geknabojn de la ĝemelaj urboj Herzberg kaj Góra, kiuj ĉeestis la apudan samtempan aranĝon, kaj ofte venis kun ni por la distraj vesperoj kaj solenaĵoj ).

Tiu signifas ke, krom la poloj kaj germanoj, kiuj estis en granda nombro, por la 20 aliaj nacioj, ĉiu disponis pri unu ĝis kvin partoprenantoj. Tio rezultigis, ke la partoprenantoj de malgrandaj kaj grandaj nacioj estis pli malpli en proksima kvanto, la plej malgrandaj estis same gravaj kiel la plej grandaj. La avantaĝo estis ke, en nur unu horo, vi povis paroli sinsekve kun ĉino, japano, dano, finlandano, kubano, svisino, makedonino, baratano, kroatino, aŭstraliano, ktp... Tio donis belan senton de egaleco kaj diverseco en kontaktoj.

Mia dua plezuro estis renkonti personojn, kiuj kutime dum la UK malaperas en la granda amaso, ĉefe la usonanojn kaj la aŭstralianojn. En tiu ekvilibra miksaĵo ĉe Herzberg-aranĝo, ili estis tute videblaj, kaj mi malkovris tre interesajn personojn.

La tria plezuro estas ke, danke al tiu miksaĵo en ne giganta totala nombro, ni estis tre proksimaj de la homoj, kiujn ni ne kutime renkontas, ĉefe la estroj, la prelegantoj, la animantoj, la organizantoj, ĉiuj, kiuj havas gravan rolon en la movado kaj kiuj kutime estas ĉirkaŭataj de tiom da admirantoj, ke oni ne povas alproksimiĝi de ili. En Herzberg, ni povis diskuti kun tiuj gravuloj dum la paŭzoj aŭ dum la komunaj manĝoj, ĉar ni ofte manĝis kune kvaŭ parencoj.

Pro la fakto, ke ne estis distraĵo en la vilaĝeto *Sieber*, ĉe kiu estis nia kongresejo (neniu magazeno, neniuj telefon-eblo nek ret-eblo en la kongresejo -pro la monto-, ret-aliro nur en la hotelo, neniuj distraĵoj ekster tiuj produktitaj de ni), ĉiuj sentis sin fratoj. Aldonu al tio, la fakton ke ni estis en mirinde bela natura pejzaĝo, tre kvietaj, ke la sono ĉiam brilis sen troa varmo.

Aldonu la fakton, ke paroli esperanton kun diverslandaj nekonatuloj, sen problemoj de kompreno, estigas eksterordinaran mensan ebricon, kaj vi komprenos ke niaj vesperoj estis ege ĝojaj, entuziasmaj, kun ridoj, kantoj, dancoj, ludoj, farandoloj.

Tio pri la ĝenerala etoso...



Nun pri la programoj.

La unuan vesperon, ĉiuj alportis produktojn de sia lando por komuna disdivido. Tre variaj estis la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, la plej ekzotaj estis la aziaj. Ni faris mondan esploradon de pladoj.

Iom post la komenco de la manĝo, ĉiu devis prezenti siajn alportitajn bongustaĵojn kaj rakonti pri ili.

Sabate matene, okazis la vizito de la urbo en du grupoj : la parko kun lago, la esperanto-centro tre modesta, sed enhave tre riĉa kaj perkfekte ordigita, la kastelo kun la tre interesa muzeo, la busto de Zamenhof, kaj ie kaj tie diversaj paneloj en esperanto : sur arboj de la parko, sur strato-montriloj, en la parto de la muzeo dediĉita al la lingvo, ĉe la menuoj de kelkaj restoracioj.

Mi antaŭsupozis, ke estas pli da fanfaronado ol da reala esperantistiĝo de la urbo. Fakte, laŭ la malfortaj rimejoj de tiu urbo de 14 000 loĝantoj, kaj la malmultnombraj aktivaj homoj por zorgi pri la konkreta esperantigo, la laboro jam farita estas giganta. Posttagmeze, ni havis apartan plezuron konstati, ke la urbestro parolas esperanton, ĉar okazis en Sieber la inaŭguro de la memor-ŝtono apud la ponteto, kiu ricevis la nomon "*ponto de l'espero*". Plie, en la plej grava hotelo-restoracio de Sieber, la deĵorantoj parolas fluan esperanton : iu revo por mi.

Estus longe paroli pri la diversaj vesperaj muzikaj programoj; folkloraj muzikistoj, lokaj muzik-istoj ( malmultaj spektantoj restis sur seĝoj sen kanti aŭ farandoli ), internacia programo kun kontribuoj de *Julian Hernandez*, de *Hori Jasuo*, de la geknaboj, de unuopuloj...

Pri la seriozaj programoj: Ni ĝuis dudekon da bonegaj prelegoj, kiuj daŭris unu aŭ du horojn, kun: *Mireille Grosjean*, *Rudolf Fischer*, *Peter Zilvar*, *Katalin Kováts*, *Gian Carlo Fighiera*, *Sabine Trenner*, *Zsófia Kóródy*, *Maria Jerković*, *Ilona Koutny*, *Sebastian Kirf*, *Sro Huang (Trezoro)*, *Pierre Bouvier*, *Sosu Moinhos*, *Stefan Mac Gill*, *Duncan Charters*, *Rob Moerbeek*, *Martin Ptasiński*, *Mihai Trifoi*. Pluraj aperis kiel novuloj kaj montris veran talenton.

Du aliaj programoj bezonis plurajn tagojn, mi citu tiun de Katalin Kováts, kiu estis metodika seminario, kaj tiu de Sabine Trenner, kiu temis pri solvo de konfliktoj. Mi partoprenis la serion kun Sabine kaj mi ricevis tre interesan programon, en kiu ni devis ofte cerbumi, rolludi, aktivi, imagi, inventi sed ankaŭ moviĝi. Kvankam Sabine petis de ni multe da klopodoj, mi rimarkis ke la sama grupo fidelis, ne timis torturi la cerbon, sed ni ankaŭ multe ridis kune.

Pri la komitat-kunvenoj, ŝajnas ke ili bone laboris. Mireille Grosjean estas nia nova prezidanto ĉe ILEI.

Ne okazis apartiĝemo inter junaj kaj malpli junaj homoj. Ekzemple, lastan tagon Mireille ludis kun infanoj. Kun *Nicole Else*, kiu montris filmetojn, ni estis en la mondo de esperantigitaj fabeloj sur bookbox, do en teknike moderna afero, kaj iom antaŭe grupo apud *Rob Moerbeek* kaj *Gian-Carlo Fighiera* avida aŭskultis iliajn privatajn spertojn kun *Ivo Lapenna*. Ni estis en la nuntempo, en la futuro kaj en la pasinteco, ĉio same valoris.

Mi revenis plena de belaj memoroj kaj de energio, kvazaŭ mi restintus unu monaton en paradiza mondo, kun multaj fotoj, kaj plie kun belaj konkretaj objektoj: vitraj juveloj faritaj de Katalin.

Mi ne sukcesis rakonti ĉion. Mi ne parolis pri la libro-servo, pri la ekskursoj, pri la ekumena religia momento en la preĝejo de Sieber. Estis tro multe por rakonti.



*Ginette MARTIN* - 23an de julio 2013



12-18-jaraj mezlernejoj el *Herzberg am Harz*, kaj *Mazara del Vallo*, dum studvojaĝo al *Győr*, Hungario, enkadre de la *Comenius-projekto GUTO* (A Guided Tour from the Local Castle to the European House - *Vizito de la loka kastelo al la Eŭropa Domo*) la **26an de septembro**, organizos "Lingvan Tagon" en la hungara gastiganta lernejo en *Győr*, kaj festos la **Eŭropan Tagon de Lingvoj**. La tri partnergrupoj (germana, hungara kaj itala) apartenas al tri diversaj lingvaj familioj, sed ili havas iun komunan: ĉiuj lernas kaj parolas Esperanton – la neŭtralan internacian lingvon.

*Zsófia Koródy*

(NB - el la redakcejo: nia bulteno 163, bedaŭrinde, aperis tro malfrue por informi pri la evento).

<b>Organizita de</b> <b>MULHOUSE</b>  <b>ESPERANTO</b> En amikaj rilatoj kun <b>BAVELO</b>	<b>75a printempa</b> <b>staĝo de</b>  <i>France-Est</i>
	<b>Okazos la 4 / 5 / 6-ajn de aprilo 2014</b> <b>En la Feriejo Le Torrent</b> <b>4, rue de Mollau, 68470 STORCKENSOHN</b>



*Accueil, Rencontre, Découverte*

Ĉi-tiu ferio-komplekso situas meze de altaj Vogezoj, ĉe rando de arbaroj en mirinda sep-hektara parko.

Ĝi troviĝas survoje inter Thann kaj Bussang.

Apartaj duŝejo kaj necesejo por 2 ĉambroj.

#### Atingeblecoj:

Plej proksima stacidomo de la staĝejo troviĝas je 3 km en **Wesserling**.

Inter **Mulhouse** kaj **Wesserling** veturas pluraj regulaj trajnoj kaj aŭtobusoj en la tago.

Ni povos sendi al vi la diversajn horarojn inter tiuj du stacidomoj kaj laŭ peto ni veturigos vin de la staci-domo de Wesserling al la staĝejo.

#### KURSOJ

##### A: Komencantoj (débutants)

Cours pour débutants par Ginette Martin. Elle apportera le matériel adéquat.

##### C: Progresantoj :


Paroliga kurso tute en esperanto. Gvidas Edmond Ludwig

##### E: Seminario:

Prelegas Hannes Larsson

##### Sabate posttagmeze

La violono. Tio inkluzivas ĉion: historio, violonfarado, ludtekniko, komponaĵoj kaj violonistoj.



##### Dimanĉe matene

Spertoj de novaj esperantistoj La etoso de la prelego estas humura. Esperanto estas ja universala lingvo, sed necesas alkitimiĝi al la akĉentoj de la hispanoj, britoj, rusoj, japanoj kaj (por eksterlandanoj) la francoj.

##### Distra vespero

##### Kantos Mélanie PRIN

Jen nova juna talento ! Ŝi kantas en pluraj lingvoj, inter aliaj en Esperanto. Talento malkovrita dank'al <http://pola-retradio.org/>



Aktualigitaj informoj kaj aliĝilo aperos en nia retejo: <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr> kaj en la posta numero de La Informilo

### Provizora Programo:

#### Vendrede 4-an de aprilo 2014

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti 19a30 Vespermanĝo
- 21a45 Malfermo de la knajpo.

#### Sabate 5-an de aprilo 2014

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Turismado al
  - Du muzeo
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de la alvenantoj

- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj A, C, kaj E.

- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero
- Knajpo

#### Dimanĉe 6-an de aprilo 2014

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, C, kaj E
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a
- Poste: disiĝo

ALIĜOJ	antaŭ la 1a de februaro 2014	ekde la 1a de februaro 2014
Ĉef-aliĝanto abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio	20 €	25 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilon"	35 €	40 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	15 €	20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj	2 €	4 €

#### Restado-kostoj

Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo)	40 €
Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj)	47 €
Suplemento por individua ĉambro	9 €
Apartaj manĝoj	16,50 €



## vorlasis nin grava subtenanto de esperanto

Profesoro **Albert JACQUARD** forpasis la 11an de septembro 2013.

Li famis ne nur kiel elstara sciencisto ( interalie pri genetiko ), sed ankaŭ en Esperantio pro lia multface-ta kaj daŭra subtenado de la internacia lingvo.

Sube, ĉerpita el *Vikipedio* ...

Profesoro Albert Jacquard senambigue esprimis sin favore al Esperanto kiel solvo al la problemoj de lingva komunikado, precipe en kvar radio-elsendoj de *France Culture*, en julio 2004. Per patronado, li krome subtenis politikajn iniciatojn, en 2004, por la listo *Eŭropo - Demokratio - Esperanto* en la parlamentaj EU-balatoj, kaj en 2007, por la listo *Espéranto Liberté ( Esperanto Libereco )* en la prezidentaj balotoj en Francio.

En 2011, li akceptis patroni la en Francio landskalan petskriban kampanjon "*L'espéranto au bac*" ( kunorganizita de *Espéranto-France* kaj *SAT-Amikaro* ) favore al aldono de Esperanto kiel ĉe kromfako elekteblan lingvon por la bakalaŭriĝa ekzameno. Li jene esprimiĝis:

*« Mi ricevas kiel honoron la proponon, kiun faras al mi ambaŭ asocioj Espéranto-France kaj SAT-Amikaro, patroni tiun petskribon favoran al Esperanto.*

*Mi deziras, ke lernado de Esperanto estu oficialigita de la aŭtoritataj instancoj de multaj landoj. Tago venos, kiam ĉiu homo kapablos uzi Esperanton kiel ilon de komunmeto. Disvolvi uzadon de Esperanto estas maniero gardi la estonton de la franca lingvo ».*

Li ankaŭ verkis postparolon por la 10a eldono (2006) de la fama franclingva lernmetodo de Esperanto "*Racia Kurso*" ( *Cours Rationnel* ).

Li esprimiĝis mens-frape en "*Nouvelle petite philosophie*" ...



[ ... / ... ] *« La langue, c'est la pensée »* ... qu'est-ce qui nous empêche de penser dans une langue qui n'a pas de sang sur les mains ? Car le fait que l'espéranto soit une langue nouvelle répondant à une situation de communication nouvelle n'entraîne pas qu'elle n'a pas d'histoire.

L'histoire de l'espéranto, c'est l'histoire d'un jeune garçon qui souffre des discriminations et vexations causées par les barrières linguistiques, puis devient *« L'homme qui a défié Babel »*.

C'est l'histoire de toute une communauté de *« samideanoj »*, partisans d'une même idée qui, pendant plus d'un siècle, ont porté cette


langue sur les cinq continents, l'ont utilisée dans toutes les situations de la vie, ont découvert grâce à elle les richesses de la diversité culturelle.

C'est l'histoire d'une langue qui se veut simple pour être la langue de tout le monde, y compris des gens simples, et pas seulement de ceux qui dépensent des milliers de milliards de dollars pour conquérir le pétrole de l'Irak, en espérant, par ailleurs, que l'hégémonie de leur langue et de leur cinéma leur rapportera suffisamment de milliards avant que leur domination ne devienne contestable.

**Il y a plusieurs manières d'écrire l'histoire, avec des bombes ou avec des idéaux. Les plus grandes pages de l'Histoire ont été écrites plutôt avec des bombes... mais les plus belles ?**

Jen teksto sendita –tradukita !- de nia samcelano kaj amiko Bernard BEHRA, kiu elvokas "konsilojn" de la humanisto Albert SCHWEITZER

### POR RESTI JUNA



*La juneco ne estas periodo de vivo, ĝi estas menso-stato, ĝi estas impulso de volo, viglo de kreema imago, forto de sentoj, venko de kuraĝo super la malbraveco, triumfo de aventura spirito kontraŭ la pigreco.*

*Neniu maljuniĝas pro la amasiĝo de vivo-jaroj : oni maljuniĝas nur kiam oni forlasas siajn idealojn.*

*La haŭto faltas laŭ la fluo de jaroj, sed la fakto rezigni je entuziasmo donas faltojn al la animo.*

## Kiam ĉina "aventuro" konkludas apoteoze !



La legantoj de *La Informilo* frandis plurfoje la raportojn abunde ilustritajn de Bruno HENRY, el Nilvanĝe, agema prozelito, al kiu ni ŝuldas plurajn staĝojn proponitajn en la regiono.

Post malkovro de Ĉinio sub la gvidado de sia ĉiĉeronino, li ne povis rezisti al la ĉarmo de Manjuan (Gracia), kaj la solena geedziĝo okazis en Nilvanĝe, la 24an de aŭgusto.

Jen eta teksto verkita de la freŝbakita paro, kiu raportas pri pli ol riĉaj vivsekvencoj.

"Ni, Gracia kaj Bruno, estas anoj de la granda fervojista familio..."

Dank'al Esperanto kaj al la *Koresponda Servo Mondskala*, ni interkonatiĝis. Gracia ofte diras "*Dank'al D-ro Zamenhof ni interkonatiĝis !*"

Nia ĉiutaga lingvo estas la lingvo internacia Esperanto !

La komenco de nia aventuro okazis, kiam Bruno ricevis la unuan retmesaĝon de Gracia. Je tiu momento Bruno estis en urbo *Chiraz* la pinto de sia vojaĝo en *Irano*, kie li vizitis geesperantistojn, la 14an de aŭgusto 2012.

Ek de tiu momento ni interkorespondis ĉiutage, eĉ ie ajn en la mondo. Poste ni interparolis pere de « Skype »...

Finfine, dum la pasinta vintro, ni interkonatiĝis en la urbo *Changsha*, kie loĝas Gracia. Changsha estas ĉefurbo de provinco *Hunan*. Dum du monatoj ni faris mirindan vojaĝon en Ĉinio per la trajno en la malmola klaso, kun ĉina popolo, kaj ni renkontis aliajn esperantistojn en diversaj urboj.

Dank'al Gracia, Bruno vizitis multajn historiajn urbojn, naturajn vizitindaĵojn en tiu mistera granda lando, riĉa je historio kaj kulturo. Ni trapasis kelkajn tagojn en la kamparo kun familianoj, kaj Bruno interkonatiĝis kun ŝiaj geamikoj kaj familianoj en urbo Changsha.

Nun ni vivas kune en Changsha kaj Nilvanĝe, kaj ni vivas inter tri kulturoj: la ĉina, la franca kaj la esperanta !

Ni vojaĝos de tempo al tempo, renkontos geamikojn kaj vizitos familianojn.

Unu el niaj ideoj: ni ŝatus vojaĝi de Changsha al Nilvanĝe per la trajno *tra Mongolio kaj Siberio* !... . Eble survoje ni renkontos aliajn esperantistojn".



Manjuan ( Gracia ) ZHANG  
Bruno HENRY  
Blogo : <http://brunoh.olymp.ee>





*La ĉagrenoj, la dubo, la manko de memfido, la timo kaj la perdo de ĉiu espero estas kvazaŭ longaj, tre longaj jaroj, kiuj kuntrenas la kapon al la tero kaj kurbigas la menson en sia rekteco al la polvo.*

*Eĉ se oni aĝas sepdek aŭ nur dek-sep jarojn, en ĉiu el ni funde de la koro vivas la nostalgio de plezurego, la admiro kiu grandigas nin fronte al la eternaj steloj, la eternaj aferoj kaj pensoj, la aŭdaco libera el ĉiu timo, la serena ĝojo, la apetito vivi kaj la infana nesatigebla atendo pri tio, kion la morgaŭo alportos al ni.*

*Vi estas tiom juna kiom via memfido kaj tiom maljuna kiom viaj duboj, tiom juna kiom via fido kaj tiom maljuna kiom viaj timoj, tiom juna kiom viaj esperoj kaj tiom maljuna kiom viaj senkuraĝigoj.*

*Vi restos juna tiom longe kiom atingos vian koron la mesaĝoj de beleco, de ĝojo, de aŭdaco, de grandeco, de homa estulo kaj de senfineco.*

*Kiam vi malsupren lasos pendu viajn flugilojn, kiam kio plej profunde vivas en via koro estos kovrita de neĝo de pesimismo kaj de glacio de cinikismo, nur tiam vi vere estos fariĝinta maljuna.*



La loka asocio proponas densan programon por la "lern-jaro" 2013 / 2014 ...

Jam disvolviĝis iu kutima "esperanto-semajno" ( 23 /28 sept. ) kun "découverte de l'espéranto" dialogo kun ĉe estantoj kaj filmeto oportuna, "cours express", doku ment-filmo "Tornadoj", ellaborita kun subteno de "le Vaisseau", eduk-komplekso de la Ĝenerala Konsilio Depar-



tementa Bas-Rhin, koncert-konferenco de Guillaume Armide \*\*\* kaj "café littéraire".

Aldoniĝas al la "semajno", AG de la asocio, lingvo-aperitivo kaj malfermo de la jaraj Eo-kursoj.

<http://www.esperanto-strasbourg.net>

\*\*\* Guillaume Armide



"... a mis son talent de pianiste au service de l'espéranto en écrivant un spectacle où il mêle la musique et un discours sérieux qu'il appelle Concérence ( mot-valise composé de Concert et conférence ) pour présenter les qualités de l'espéranto et son utilité pour améliorer la communication internationale, en gardant un ton général léger et drôle".

## GREZILIONO

Pri neforgesebla restado en la kastelo raportas 23 somerajgastoj en

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique8#o>

Sekva grava evento dum la lernejoj ferioj:

**AUTUNE - AUtuna TUmulta NEsto**

25-a de oktobro ĝis 1-a de novembro 2013

**INFANOJ:** *Ansofi Markov* animas per ludoj kaj iom da instruado. Valère Doumont gvidas Verdajn Skoltojn. Jak O'Lantern' festas Halovenon.

**KURSOJ:** *Christian Rivière* fake aplikas Esperanton. *Serge Sire* esp-igas poezion kaj teknikajn indikojn. *Bert Schumann* paroligas komencantojn per rekto *Cseh-metodo*.

**AKTIVAĴOJ:** *Serge Sire* realigas humurajn bildojn. *Daniel Durand* pri: *Homaj rajtoj, la nuntempa utopio*. Promenadoj tra la parko kaj arbaro. Libroservo ktp.

**VESPEROJ:** Kabaredo, blovmuziko, komiksoj, tabloludoj kaj via kontribuo!

**AUTUNE - AUtuna TUmulta NEsto**

Detaloj en <http://gresillon.org/autune>

Reta aliĝilo <http://gresillon.org/aligha>

Papera aliĝilo <http://gresillon.org/alighilo>

## filmetoj

Jen adresoj de freŝe faritaj invit-filmetoj por la du ĉefaj Esperanto-aranĝoj de la sekva jaro:

\*

**IJK – Internacia Junulara Kongreso, 18-25 julio, Fortaleza, Brazilio:**

<http://www.youtube.com/watch?v=DyQYNj7PJJ4>

**UK – Universala Kongreso de Esperanto, 26. julio - 2. aŭgusto, en Bonaero, Buenos Aires, Argentino**

<http://www.youtube.com/watch?v=iFZego1jLyk>

La *Internacia Kalendaro de Esperanto-Aranĝoj* listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn: *dato, nomo, priskribo, organizaj adresoj, ktp.*

Uzu la *Kalendaron* por informiĝi pri Esperanto-renkontiĝoj, kaj anoncu vian aranĝon, se ĝi mankas en la listo!

Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro:

<http://www.eventoj.hu>



## les sciences en s'amusant - klerigaj bildstrioj



Franca emerita sciencisto, *J-P Petit*, fariĝis fama antaŭ kelk' dudek jaroj pro siaj bonegaj, samtempe klerigaj kaj humuraj bildstrioj, per kiuj li komprenigis al ĉiu mezlernejnivela leganto multajn fakojn sciencajn, inkluzive de la "neŭklidajn geometriojn" aŭ "kosmologion"!

Kiel li diras, li faris ke scienco iĝu komprenebla eĉ al ministro !



[http://www.youtube.com/watch?v=aa4hA\\_Ocrbc](http://www.youtube.com/watch?v=aa4hA_Ocrbc)

Liaj libroj ne plu estas reeldonitaj, do li metis ilin *je libera aliro en TTT-ejo* sencoplene nomita "*scio sen landlimoj*" kun devizo: "*Ĉio, kio ne estas donita, estas perdita*", kaj vokis traduki ilin al kiel eble plej da lingvoj.

**Du inter ili estis esperantigitaj !** ĉi-tie la ligo al tiuj-ĉi du albumoj:

[www.savoir-sans-frontieres.com/JPP/telechargeables/free\\_downloads.htm#esperanto](http://www.savoir-sans-frontieres.com/JPP/telechargeables/free_downloads.htm#esperanto)

kaj ĉi tie vi trovos la plenan liston de ĉiuj liaj albumoj, kaj ĉiuj tradukoj al plej diversaj lingvoj (vidu ili jam multas!) :

[www.savoir-sans-frontieres.com/GILLES/test.php](http://www.savoir-sans-frontieres.com/GILLES/test.php)

Télécharger des bandes dessinées scientifiques traduites - Download translated scientific comics strip ...

et ici de la physique amusante en hindi:

[video.google.com/videoplay?docid=2009541644449412795&hl=en](http://video.google.com/videoplay?docid=2009541644449412795&hl=en)

... ça peut aider pour apprendre le hindi aussi !

Por vi, aŭ por viaj geamikoj komprenantaj la germanan lingvon !!!!...



Iĝis modo la verkado de krimromanoj okazantaj en iu difinita regiono, kio ebligas al la leganto imagi la scenojn pro intima kono de la lokoj.

Tiajn krimromanojn verkas *Thorsten Süße* el Hannover ( Germanio ). Kaj titolo kiel *Toter lehrer*, ( *Morta instruisto, bona instruisto* ) ja certe allogos gelegantojn !!!!... Sed la specifaĵo de *guter Lehrer* tiu romano koncernas Esperanton : pluraj figuroj de la rakonto parolas Esperanton kaj, fakte, Esperanto ĉefrolas ! Tio ebligas al la aŭtoro informi tutnature la legantojn pri la Internacia Lingvo !

Mi persone aldonu, ke la romano estas ege atentokapta kaj donacinda !

Edmond LUDWIG

"*Toter Lehrer, guter Lehrer*" ( Thorsten Süße ) CW Niemeyer Buchverlage GmbH Hameln ISBN 978-3-8271-9454-1



# Nepre mendinda, spektiinda, emfazinda, spektiginda !



Ĉi tiu filmo, de la reĝisoro Dominiko GAÛTIERO, proponas vojaĝon tra la mondo, renkonte al la historio de la lingvo Esperanto, al ĝia strukturo kaj al ĝiaj hodiaŭaj parolantoj. Kaptitaj en la diverseco de siaj aktivaĵoj kaj vidpunktoj, la vortoj de tiuj lingvouzantoj interplektiĝas, rivelante pecon post peco kiel konkretiĝas ĉiutage la utopio de ties iniciatinto, Ludoviko ZAMENHOF

*Kun sia historio, sia spirito, sia klopodo, sia ideologio, Zamenhofo estas persono ne ordinara. Laŭ filmarta vidpunkto, temas pri « heroo », kiu vekas intereson kaj simpatian. La filmstrukturo konstruiĝas sur bazo de la historio de Esperanto kaj ties elpensinto. Ĉiuj gravaj eroj de la historio resendas al antaŭa situacio.*

*Pritrakti la historion de Esperanto laŭlonge de la filmo donas plurajn avantaĝojn : malkovrigi la historion sen enui per tro longa sekvenco, ligi tiun historion kun la nuno, la klopodon de Zamenhofo kun la hodiaŭa aktivismo, malpeze elvoki la organizadon de la movado kun ties strukturo, montri kiel la utopio de Zamenhofo troviĝas en la realo, lin paroligi per citaĵoj, eksterbilde luditaj far aktoro, reliefigi la indecon kaj la adaptiĝon de Esperanto al la moderna mondo, formale ludi per etosaj kaj ritmaj ŝanĝiĝoj.*

**22 lingvoj :** العربية, Català, Deutsch, English, Español, Esperanto, Suomi, Français, Magyar, Italiano, 日本語, 한국어, Nederlands, Polski, Português, Kréol réyoné, Română, Русский, Српски, Svenska, Tiếng Việt, 中文

Originala dokumentfilmo  
Aŭtoro : Dominiko Gaŭtiero  
DVD - 64 minutoj  
Eldonita en julio 2013  
EAN : (37)00831800(00)4

Prezo : 18 eŭroj aŭ 40 eŭroj (kun rajtigo spektigi al publiko)

<http://www.satesperanto.org/eldonkooperativo/spip.php?article95>

aldone:

Antaŭmendintoj tamen ne atendu, ke la atendata DVD tuĵtuje atingos ilian hejmon. Prizorgos la sendojn al unuopuloj kaj grupoj nur unu homo, kiu krome jam prizorgas la ceterajn libroservaĵojn de SAT kaj SAT-Amikaro, kiu dume plu funkcias. Kaj plie estos iuj sendoj pli prioritataj ol aliiuj ( ekzemple se estas projekciado planita por preciza baldaŭa dato, kompreneble ni klopodos akurate sendi ). Do restu ankoraŭ iom pacienca, la filmo survojas al vi!

Por homoj kiuj ne antaŭmendis, sed nun deziras akiri la filmon, ĝi tre baldaŭ haveblos en ĉiuj bonaj libroservoj de Esperantio, kaj espereble eĉ ekster !

## DVD filmo - disko "ESPERANTO" mendilo

Nomo: ..... Antaŭnomo: .....

Adreso: .....

Tipo **18 €** - nombro: ..... Tipo **40 €** - nombro: .....

Pagenda sumo: .....

Dato: .....

Subskribo


Redakti ĉekon je la nomo de:

**Eldona Fako Kooperativa de SAT**

SAT-Amikaro - *sevice librairie*

67, avenue Gambetta

75020 PARIS



... pas pour longtemps !



Face à l'engouement croissant des Européens pour l'adoption de l'anglais comme "lingua franca", un intellectuel roumain lance un signal d'alarme et appelle à la mobilisation en faveur de la sauvegarde des langues nationales.

" ... J'écrivais, récemment, sur le danger qui guette la langue roumaine dans ses propres contrées. Et ce, non pas à cause d'une quelconque baisse de ses locuteurs, imputable à la dégringolade du nombre de naissances ou à la migration massive des Roumains, mais bien à cause des politiques actuellement menées dans l'Education nationale. Le fait que de nombreux travaux de post doctorat soient déposés en anglais, et qu'on ne valorise que les travaux publiés dans les revues étrangères et écrits en langue véhiculaire, a largement contribué à accentuer le désintérêt pour les publications scientifiques roumaines. Mais aussi à déprécier la langue, à moyen et long terme, au sein de l'intelligentsia ".



Né en 1959, Ovidiu Pecican est un écrivain, historien et journaliste roumain. Il est également professeur à l'Université Babeş-Bolyai de Cluj, et éditorialiste pour *România liberă*.

Jazyky:	Bojujme proti nadvládě angličtiny
Sprachen:	Gemeinsam gegen die Übermacht des Englischen
Languages:	All united against dominance of English
Idiomas:	Todos unidos contra el dominio del inglés
<b>Langues:</b>	<b>Tous unis contre le règne de l'anglais</b>
Lingue:	Basta con la dittatura dell'inglese
Taal:	Maak einde aan dominantie van het Engels
Języki:	Razem przeciwko dominacji angielskiego
Linguas:	Todos unidos contra o reinado do inglês

Appel relayé par PRESSEUROP

Presseurop.eu est un site d'information basé à Paris et qui publie quotidiennement une sélection d'articles choisis parmi plus de 200 titres de la presse internationale, traduits en dix langues - anglais, français, allemand, espagnol, roumain, italien, portugais, néerlandais, polonais et tchèque.

## Les cadres sont mal à l'aise avec l'anglais

Le Figaro.fr Publié le 09/09/2013 à 07:30

La langue de Shakespeare est un outil de travail incontournable pour de nombreux cadres, mais plus de la moitié sont préoccupés par leur niveau, y voyant un frein à l'embauche ou à l'évolution de carrière, selon une étude publiée lundi.

Selon cette enquête de *Cadre emploi* et de l'organisme de formation *Ito1 English*, plus de 83% des cadres sont amenés à utiliser des langues étrangères, l'anglais étant de loin la plus fréquemment utilisée (66,6%) devant l'espagnol (12,7%), l'allemand (10,4%) et l'italien (5,2%).

En anglais, près de la moitié des cadres (46,8%) estiment avoir un niveau débutant ou intermédiaire tandis qu'ils sont 36,4% à juger leur niveau "opérationnel" et quelque 16% à estimer parler un anglais courant. Mais **près de la moitié (48,4%) indiquent avoir du mal à prendre la parole dans cette langue et 42,8% ne se sentent pas à l'aise pour écrire un courrier ou un email.**

Lors des entretiens d'embauche, plus de six cadres sur dix (60,3%) rapportent également avoir dû s'exprimer en anglais, mais **seuls quelques 27%** se sentent assez préparés pour soutenir un entretien dans cette langue.

Aussi, **plus de la moitié des sondés (56,4%)** conçoivent leur niveau d'anglais comme un frein à l'embauche et à l'évolution de carrière, environ 32% n'y voyant pas de problème et les autres étant sans opinion.

L'étude a été réalisée du 18 au 21 juin par le biais de questionnaires auto-administrés en ligne auprès d'un échantillon de 3.896 personnes.

NB - la redakcio de "La informilo" kulpas pri la humura bildo kaj pri a grasigitaj kaj ruĝaj literoj ...







# El nia libroservo



## Resumoj, recenzoj, opinioj...el Edmond Ludwig

Nia samideano Tomasz CHMIELIK, kies prelegajn talentojn vi eble malkovris en la printempa staĝo de La Petite Pierre, meritas la kromnomon : la tradukmaŝino ! Mi aldonus kroman kromnomon : la eldonmaŝino ! Jam vi legis en LA INFORMILO pri liaj iniciatoj favore al la albana moderna literaturo kunlaboro kun nia albana samideano Bardhyl SELIMI. Ĉi-sube vi malkovros erojn de lia agado por diskonigi la judan kaj la polan kulturojn pere de Esperanto. Imitinda ekzemplo !

E.L.

### POLINO (Bajram KARABOLI) 7,50 €

De aprilo ĝis julio 1995 Bajram KARABOLI deĵoris en la albana ambasadejo en Varsovio, kiam sin prezentis polino parolanta la albanan lingvon por peti vizon por sia filino. Ĉi-okaze ŝi rakontis al li sian vivhistorion kiel edzino de albano dum ilia geedza vivo en Albanio, kiam Albanio ĉesis siajn oficialajn rilatojn kun Sovet-Unio. Komenciĝis por ŝi terura vivo.

La emociplenan rakonton prezentas al ni en la pola kaj en Esperanto Tomasz CHMIELIK kaj Bardhyl SELIMI en belaspekta libreto dulingva. Laŭdinda estas ilia iniciato malkaŝi ne tre konatajn erojn de la historio de tiamaj komunistaj landoj. Lingvoj : pola kaj Esperanto.

### LA BALO EN OPERO (Julian TUWIM) 7,50 €

Fidelaj aŭskultantoj de Pola Radio ne povas ne koni la poeton Julian TUWIM (1894 – 1953). Ili lin ja ĉefe konas pri siaj poemoj por infanoj, pro kiuj li estis unu inter la plej famaj poetoj pollingvaj. Li ankaŭ tradukis multajn verkojn en Esperanton, ofte de Puŝkin kaj aliaj rusaj poetoj. Nian lingvon li lernis kiel gimnaziano, sed li neniam verkis per ĝi.

En lia poemego La balo en opero - majstre tradukita al Esperanto de Lidia LIĜEZA - Tomasz CHMIELIK verkis postparolon, kiu reliefigas la plej elstarajn momentojn de la vivo de Tuwim kaj ties kritikan sintenon koncerne la tiaman socion intermilitan. En 1939 li elmigris al Rumanio, poste al Francio, Portugalio, Brazilo kaj Usono. Nur post la milito, en 1946, li revenis al Pollando.

Por ĝui tiun 36-paĝan satiregan poemegon vi tre verŝajne ankaŭ ĝuos la tradukon de Lidia LIĜEZA, kiu demonstras la vivantecon de la Internacia Lingvo !

### BABILADO DE BONHUMORA ZAMENHOFANO (Jakobo Ŝapiro – Joŝo) 6,00 €

De kelkaj jaroj lia bildo videblas grandskale sur fasado de la urbo Białystok ! Jakobo ŜAPIRO estis ega aktivulo, ĵurnalisto, lingvisto kaj poste profesoro en komerca lernejo. Li estis motoro de la Esperanto-agado en Białystok, kaj do bonege konis la movadon. Tio ebligis al li observi la samideanojn diverslandajn kaj amuze primoki iliajn ankoraŭ niatempe aktualajn miskondutojn ! Vi do aŭdos pri S-roj Neskribemski, Oratoremulov, Reformemski, Parolulov, fraŭlino Ridemoviĉ, ktp! Tiun amuzan libreton vi povas legi aŭ malkovri aŭde pere de aldonita KD ! La registro kaj la elparolado estas perfektaj, ege ĝuindaj ! Vi aŭdos belegan Esperanton !

### EPIZODOJ ( Lidia LIĜEZA) 10,00 €

Kiu ŝatas poezion, tiu ankaŭ aprecos la versaĵojn verkitaĵajn kaj tradukitaĵajn de Lidia LIĜEZA. 48 poeziaĵoj en la pola lingvo kaj en Esperanto, kiuj delikate prezentas al ni ŝlan enon tra diversaj vivepokoj kaj animstatoj. Krome : ege belas la kovrilpaĝo.



## Por mendi librojn :

- Vi sendas vian mendon
    - per poŝto (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan mendilon)
    - per e-poŝto al «[libroservo.efe@wanadoo.fr](mailto:libroservo.efe@wanadoo.fr)»
    - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
  - Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
  - Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.
- Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo



## Novaĵoj :



1



2



3



4

1. **La aventuroj de Ŝerloko Holmeso**, Romano, Arthur Conan Doyle, *Sezonoj*, 248 p, 20,00 €.

. La angla detektivo, denove esperantlingva en tiu romano kiu, laŭ William Auld, estis la plej interesa kaj la plej legata.

2. **La bato en opero**, Poezio, Julian Tuwim, *I.L.E.I.*, 44 p, 6,00 € . *Vidu recenzon de Edmond Ludwig sur la alia paĝo.*

3. **Lundo en sep tagoj**, Poezio, Luljeta Lleshanaku, *Ŝvidnik* , 70 p, 9,00 €. 45 poemoj tradukitaj el la albana.

4. **La sloganoj el ŝtonoj**, Romano, Ylljet Aliĉka, *Ŝvidnik.*, 84 p, 10,00 €. "*Tuj post la studoj, Andreo kiel instruisto- ricevis ordonon labori en forgesita montara vilaĝo en nordo...!*"



## Nenovaĵo ĵus alveninta:



9. **La hobito**, Mirfabelo, J.R.R. Tolkien, *Sezonoj*, 224 p, 18,00 €. Alia fabelo el la verkisto de "la mastro de la ringoj",

## Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-  
-  
-  
-

En

la

al jena adreso:

S-ro/ino

-  
-  
-

Subskribo:




# ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2014 ĝis 2016

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta  $20 - 66\% = 6,80$  eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2013 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2014.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2013, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Krome vi povas elekti inter la 3 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2014	2015	2016
		Abono por adresoj en Francio:	15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
		Abono por adresoj ekster Francio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj por UFE membro:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
<b>UEA</b>	MG	• Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado.			10 eŭroj
	MJ(-T)	• Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago).			25 eŭroj
	MA(-T)	• Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo <i>Espéranto</i>			61 eŭroj
Pag-manieroj	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2013 por 1208				
	<b>2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2013, 2014 ktp. Se necese menci vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.				
	<b>3. Por Germanio al nia peranto:</b> Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)				
	<b>4. Per internacia ĝiro</b> je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adreskodon)				



## Rememoroj pri Tempo kaj Pajlo

Estas kolekto de tre interesaj rakontoj pri malnova Japanio, inter la fino de la 19a jarcento kaj la nuna moderna Japanio. La libro estas tre bele ilustrita de Susumu Saga kaj tradukita de Judyta Szczerbicka Yamato: Afrankite 26 eŭroj

Ambaŭ libroj estas mendeblaj ĉe nia kasito:  
**Espéranto France-Est CCP 1997 72W NANCY**

## Poŝamiko

### Poŝamiko

Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn ekzercojn kaj laŭ-temajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. La poŝ-forma eldonaĵo (A6) bone povas servi kiel poŝlibreto al kursanoj je komencanta kaj komencinta niveloj, aŭ kiel varbocelaj donacoj kaj propagandiloj.  
 Afrankite: 6,50 eŭroj



# Ni provu rideti!



Iu virino vizitas okuliston, akompanata de sia eta filo.

La fakulo informiĝas ...

"Nu, ĉu la etulo jam spertas vidproblemojn ?

- Ne, ne ! Temas pri mi-mem ! Sed mi petis lian ĉeestadon. Mi ja ne scipovas legi ... Li helpos por la literoj !"



Studento pri juro trapasas parolan parton de ekzameno. La deĵoranta profesoro stariĝas unu demandon ...

"Kio estas fraŭdo ?

- Tio jen kiun vi faras, estimata sinjoro !

- Hem, bonvolu klarigi al mi ...

- Laŭ la penal-kodo, tiu kiu profitas de la neklereco de aliulo, cele fari al li damaĝon, kulpas pri fraŭdo !"

\*\*\*

Iu individuo, tre aroganta, vizitas pluan fojon fak-servon por senlaboruloj.

" Ĉu vere nenio nova ? Mi tamen detale plurfoje, prialudis la problemon ! Mi estas neklera, nekuraceble mallaborema, sen iu ajn ambicio ...

Jen do kio plej plezurigus min... Eta tasko tute ne laciga, sed tamen kun bona salajro !

- Bonŝance, jen io, kion mi povas proponi al vi... Posteno de gardisto en superba vilao, rande de la "lazura marbordo", kies posedantoj ĉiam forestas. Vi rajtos profiti la tutan loĝejon, la naĝejon, privatan plaĝon, iun tutnovan BMW-veturilon kaj aldoniĝus al ĉio monata salajro je 10 000 € !"

La petanto akre protestas...

" Sed vi aĉe mokas min !

- Jes ja, replikas la oficisto, sed konsentu, ke komencis ... vi !"

\*\*\*

Iom ebria viro, kiu timas rehejmiĝi malfrue, informiĝas je kunulo, kiu trinkas apude ...

"Hem, hem... petas mi... ĉu vi povas sciiĝi al mi la horon ?

- Post du minutoj estos noktomezo ...

La petanto kolere reagas ...

- Mi volas koni la horon nun !... Ne tiun, kiu estos post du minutoj !"

Profesoro alparolas iun studenton, kiu kvazaŭ duondormus dum la prelego ...

" Vi, junulo, kiun diferencon vi povas malkovri inter nesciado kaj indiferenteco ?

- Fakte, mi ne scias... kaj cetere, mi tute fajfas pri tio !"

\*\*\*

En kazerno, iu oficiro vokas simplan soldaton, kiu purigas la korton.

" Sed kiu estas la stultulo, kiu ordonis al vi uzi la balailon je tiu-ĉi horo ?

- Hem, temas pri la adjudanto, moŝta kapitano !

- Hej !... Vi ruicevos kvar tagojn da karcerpro insulto al via adjudanto !"



Du amikinoj renkontiĝas survoje...

" Ĉu kontentige disvolviĝis la vespermanĝo en restoracio, kun via freŝmalkovrita amiko Petro ?

- Absolute nula !... Tri steloj ĉe la faklibro, ampleksa listo de pli ol bongustaj menuoj -mi vere frandis iun omaron je bretonia saŭco-akompanata de elstara blanka vino...

- Hem, mi certagrade miskomprenas ! Kial tiu respondo "absolute nula" ?

- Bone, nun, mi elvoku Petron !"

\*\*\*

En muzeo dediĉita al egita aro, vizitanto flustras al sia edzino ...

" Inter ĉiuj hieroglifoj mi sukcesas elĉifri kelkajn, kiuj elvokas la vivon de la faraonoj, la daŭron de la reĝado, la sintenon de la edzinoj kaj de la idoj ... sed spite al mia serĉado, mi ankoraŭ ne malkovris piktogramon, kiu indikus la necesejon ! ... "



Knabineto iĝas tre scivolema. Ŝi petas informon je sia patrino ...

" Manjo, ĉu Paĉjo estis tiom timema antaŭ mia naskiĝo ?

- Verdire jes ! Se la saman sintenon kiel hodiaŭ li havintus ... ci estus pli ol tri jarojn aĝa !"



Uzindirektoro grumbblas kontraŭ lia sekretario ...

" Fraŭlino, bonvolu reverki tiun leteron !

La dediĉon "Kra amiko" vi uzis por anonci miajn informojn ! Vi tamen ja scias, ke temas pri vera fripono !"

La ulino, tute trankvile, rekaptas paperfolion kaj tajpas ... "Kara kolego" !...

\*\*\*

Ateisto babilas kun amiko ...

" Mi malkovris telefonservon, kiun mi konsilas al samnekredantoj kiel mi !

- Nu, mi estas scivolema !

- Oni uzas la specifan numeron indikitan, kiam oni sentas kvazaŭ bezonon "preĝi", kaj tio ĉiam funkcias !

- Fakte, tio restas nebula por mi ... Kio okazas post via alvoko ?

- ... neniu respondas !



En kuracejo por mens-malsanuloj, gasto trotras en aleoj, kun virtuala stirilo enmane, kaj imitante la bruon de motoro, punktita de laŭta sono de avertilo ...

" Sed kion vi faras ? informiĝas flegistino.

- Priatentu sinjorino mi petas, se ne, vi riskas esti inversita !

- Kvietiĝu ! Vi ne estas aŭtomobilisto, sed simpla homo, kiu piediras kiel ĉiuj el ni !


- Ĉu vi opinias, ke oportunas rakonti tion al li, protestas alia renkontita paciento !

Imagu ! Li tiom sentas sin veturilo, ke ĉi-matene, post la duŝo, li donas al mi 30 € por ke mi poluru lin !





## 1- krucvort-enigmo



## HORIZONTALE

1. Membr' de monaĥa ordeno.
2. Plena manko de nutraĵo, kaj rezulto de tiu manko.
3. Pulvor' solvata en akvo por lavi tolaĵojn. Pronomo.
4. Sumo, ĝis kiu iu povas pruntedoni de banko.
5. Komenco de ruino. Partikulo. Centro de nafto.
6. la ajn. Pinto de terlando elstaranta el la maro.
7. Makulata de akvita polvo.
8. Neprecize etkvanta. Argileca mineral'.
9. Malgrandegul'. Centre de Romio. Sufikso uzata por formi nomojn de oksidoj.
10. Tute naiva.

## VERTIKALE

1. Komiks'
2. Interne. Vazo. Sufikso.
3. Virin', kiu eligis idon el si.
4. Ag' penetri internen de iu loko. Korinklino.
5. Ag' malkovri ion per intuicio. Koit'.
6. Elektronika cirkvit'. Recite per emfaza tono.
7. Apterig'. Meze de kapo. Infan'.
8. Litera nomo. Malpermeso ion diri pro sociaj kutimoj.
9. INVERSE: aparat' uzata de oratoro.
10. Negi. Havanta kurban formon

En la KVE de la 162a revuo, mi eraris tajpante la difinon de la vorto en la 7a horizontala linio : anstataŭ "Nedefina adjektivo", skribu "prefikso". Bonvolu pardoni al mi... Joël

## 2 - vertikala enigmo

- |   |   |   |   |   |   |                            |
|---|---|---|---|---|---|----------------------------|
| + | - | - | + | - |   | fringo-ornamo              |
| + | - | - | + | - | - | loĝanto en sia naskiĝlando |
| + | - | - | + | - |   | simio                      |
| + | - | - | + |   |   | mineralo entenanta metalon |
| + | - | - | + | - | - | moderna vojaĝilo           |
| + | - | - | + | - | - | iel malrespekti            |
| + | - | - | + | - | - | atingi kaj postlasi        |
| + | - | - | + | - | - | iama sklava servistino     |
| + | - | - | + | - | - | arta kaŭĉuko               |
| + | - | - | + | - | - | gratuli per manklakoj      |
| + | - | - | + | - | - | blasfemo                   |
| + | - | - | + | - | - | ellasi naŭzan odoron       |
| + | - | - | + | - |   | milde flustri              |
| + | - | - | + | - |   | arbo                       |

Dank' al la vorteroj ĉi-sube alfabete ordigitaj, retrovu kaj lokigu la vorton malkovritan laŭ la difino.

La unua kaj la kvara kolumno vertikale legitaj proponos mens-frapan aforismon.

ali ap ci co de di di di dri en er fe go  
ĝe in jno ĵo kra laŭ li lir lo mo ne no no  
od of op re ri rin sa sko tra to ul van

Solvaj de la lastaj enigmoj - n° 162

**Ŝmilblic** - *Stulteco ne estas hereda, sed dank' al la progresoj de la scienco tio povas espereble okazi.*

**Vertikala enigmo** - *Avantaĝo de senlaboreco: raras laborakcidento*

**Krucvortenigmo** - *Horizontale:* 1.ABELBREDAD  
2.BABILEMULO 3.IRE. AĜ. RAL 4.NAZARETA 5.URALO. EMIR  
6.REĴUNIĜI 7.ID. MODALEC 8.EIII. IDARO 9.NR. NILO. AL  
10.TIMIGI. TRO

*Vertikale:* 1.ABITURIENT 2.BAR. REDIRI 3.EBENAĴ 4.LI. ALU-  
MINI 5.BLAZONO. IG 6.REĜA. IDILI 7.EM. REĜADO  
8.DUREMILA 9.ALATI. ERAR 10.DOLAR. COLO

## 3 - ŝmilblic

Kiel kutime, kaŝita koboldo denove petolis sur la klavaro ! Ĉiu litero de la Eo-alfabeto iĝis alia dum la tajpado ! Ekzemple, ĉiuj r de la originala teksto iĝis i !

r | k b / g k ĉ c k / p g a c f p

b / c p i g k l ĉ c / c n / n c /

h f h c / g ĉ c t b / ĝ b i / k d l

l / ŝ h / n c / h f h c / g k ĉ c

k / n l e g i c .

Tiun citaĵon ni ŝuldas al alia franca humoristo, Alphonse KARR (1808 - 1890).



Miriga homo ... Ĵurnalisto kaj verkisto li ankau famiĝis pro sia emo al anekdotoj plenplenaj je humuro kaj ironio. Li eĉ publikigis "traktaĵon" titolitan " *Comment insulter une plante en latin*" ( "Kiel inssulti planton latinlingve" ) ...

Li sukcese malfermis butikon, kie eblis aĉeti ne nur florojn sed ankaŭ legomojn kaj fruktojn. Li lasis sian nomon al specio de piro " *Poire Alphonse Karr* ".

Indas ankaŭ noti, ke li iĝis sekretario de la " *Ligo kontraŭ vivosekado* ", kies prezidanto estis... Victor Hugo !

*La virinoj divenas ĉion... Ili eraras, nur kiam ili pripensas !*

# el nia fototeko




Gaja etoso en Plouezec 2013 !



Greziljono 2013 - Sukcesis renkontiĝo de infanoj



Greziljono 2013 - plezure legi en esperanto !



Instituto Zamenhof en Lomé - kaptajo el filmeto



Instituto Zamenhof en Lomé - kaptajo el filmeto



Rejkjavik - *Espéranto France* informas



Rejkjavik - hispanaj kongresistoj



Eo-kurso Ĉina studentino intervjuita